HUNGARA VIVO

5
1986
16,-Ft

Pri programoj por via libera tempo, pri enlandaj ripozebloj, pri kulturaj eventoj informas Vin

Turisma Informservo TOURINFORM per la telefonnumero 179-800, aŭ persone en la Oficejo TOURINFORM (Budapest, V., Petőfi Sándor u. 17/19./

TOURINFORM:

INFORMOJ PRI MULTAJ LOKOJ EN UNU LOKO

- Reguloj pri dogano, devizoj, pasporto, vizoj; limtrapasejoj
- Adreso kaj telefonnumeroj de vojaĝagentejoj, turismaj oficejoj, hotelaj kaj restoraciaj entreprenoj
- Restoracioj, trinkejoj, amuzejoj
- Muzeoj, artmemoraĵoj, naturprotektaj teritorioj
- Kuracbanejoj, plaĝoj
- Vojaĝoj per fervojo, sur ŝoseo, en aero
- Speciala meteorologia servo
- Poŝtaj servoj

		Per telefono	Persone
En la lingvoj hungara,	labortage	7-21 h	8-20 h
germana, angla,	sabate	7-20 h	8-20 h
rusa kaj franca	dimanĉe	8-13 h	8-13 h

Felelős szerkesztő: Benczik Vilmos. Kiadja a Magyar Eszperantó Szövetség. Felelős kiadó: Princz Oszkár, Készült a Magyar Eszperantó Szövetség nyomdájában. Felelős vezető: Varjassy Ágnes, Munkaszám: 86-0035. Terjeszti a Magyar Posta. Előfizethető bármely hírlapkézbesítő postahivatalnál, a Posta hírlapüzleteiben és a Posta Központi Hírlap Irodánál (KHI) Budapest V. József nádor tér 1. 1900, közvetlenül vagy postautalványon, valamint átutalással a KHI 215-96162 pénzforgalmi jelzőszámra. Előfizetési díj 1 évre 96,- Ft, fél évre 48,- Ft (külföldi címre 114,- ill. 57,- Ft). Egyes szám ára 16,- Ft. Megjelenik kéthavonta.

E HUNGARA VIVO

ENHAVO

László, István: Savinto de dekmiloj 162
Benczik, Vilmos: Ekonomia turnopunkto 164
Ertl, István: La rock-opero en Hungario 167
Radio Budapest — en Esperanto 171
Bessenyei, Tibor: Pajlo aŭ lumo? 172
MacGill, Stefan: Mejloŝtona bukedo 173
Bálint, Szilárd: La fermita koverto 175
Potts, Bertram: Plaĉe tuŝas mian koron 176
József Mátéffy (1905-1986) 177
Artistino Nelli Németh 179
Panoramo 180
Fenyvesi, Ervin: Revuo de revuoj 183
Librovendado 1985 185
Premio por Zoltán Fejér 185
Nagy, Lajos: La tero *(Sándor Szalay)* 186
Szántó, Gábor: Nuda paco??? *(Ervin Fenyvesi)* 189
Bodorkós, György: Novaj teknologioj en metalurgia fabriko 1. *(Ervin Fenyvesi)* 192
Queneau, Raymond: Stilekzercoj *(István Ertl)* 197
Fenyvesi, Ervin: Gaja paĝo 198
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 199
Leterkesto, Korespondi deziras 200

Sur la frontpaĝo: „Papavetreĝino" — pentraĵo de Nelli Németh (Foto de Z. Fejér)

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio

Adreso: Budapest VIII.
Kenyérmező u.6. H-1081
Poŝta adreso: Budapest
PF. 193. H-1386
Apedas dumonate
MESz nyomda 86-0087
XXVI. jaro, 1986 n-ro 5 (129)

TEMA VARIECO...

karakterizas tiun ĉi numeron, kies frontpaĝon ornamas bela pentraĵo de juna hungara pentristino: pri ŝi — Nelli *Németh* — oni povas legi koncizajn informojn sur la paĝo 179.

La hungaran literaturon reprezentas en tiu ĉi numero novelo de Lajos *Nagy*, firma realista kreanto de la unua duono de tiu ĉi jarcento. La ŝatantoj de la originala beletro povas legi la poemojn de Julio *Varga*, ĉijare forpasinta minorvoĉa esperantista poeto. Literaturamantojn certe interesas ankaŭ la listo de tiuj libroj, kiuj plej bone vendiĝis ĉe HEA dum la jaro 1985: oni serĉu ĝin sur la paĝo 185.

Tamen ne la literatura parto plej fortas en tiu ĉi numero — ĉifoje ricevis plian emfazon publicistikaj kontribuaĵoj. Ni aperigas artikolon pri la stato de la hungara ekonomio en stilo tute ne apologia, strebante komprenigi al la eksterlandaj legantoj la problemojn, kiujn nia lando nuntempe alfrontas.

Nia nova kunlaboranto István *Ertl* artikolas pri la hungara rock-opero, pli precize pri du tre sukcesaj verkoj, kiuj per historia kaj mitologia temo kapablas peri tranĉe aktualan moralan mesaĝon al la publiko.

Naturismo — post varmaj diskutoj en la socio — nur antaŭ kelkaj jaroj estis akceptita en Hungario: ĝi ne plu vekas bruon, fariĝis normala, kutima, eĉ iom moda afero. Nia artikolo intencas prezenti, kiajn problemojn havas la naturisma movado post la „venko"?

Kompreneble ankaŭ en tiu ĉi numero oni retrovas la kutimajn rubrikojn. Do, kelkaj nekutimaj artikoloj plus la ripozigaj kutimaĵoj espereble certigas teman kaj stilan ekvilibron, kio siavice signifos, ke tiu ĉi numero malgraŭ la neĝustatempa apero trovos plaĉon ĉe la legantaro.

Savinto de dekmiloj

Kolonelo Imre Reviczky (1896-1957)

Okaze de la 90a datreveno de lia naskiĝo estas inde, ke ni rememoru pri tiu homo, kiu dum la dua mondmilito, en la jaroj de la multege detruanta faŝismo, en respondeca ofica posteno povis resti homo, eĉ kuraĝis protekti la persekutatajn homfratojn. Tio signifis tiutempe la riskon de la propra vivo, kaj tiun de la familio. Lia tiama agado meritas, ke multaj ekkonu lian modestan humanismon.

La rememoradon helpas antaŭ nelonge aperinta, preskaŭ 800 paĝa libro en la hungara lingvo, sub la titolo *Perditaj militoj — gajnitaj bataloj*. Sed la libro samtempe ankaŭ malfaciligas la trarigardon de lia vivo, ĉar jam ĝia amplekso pruvas, ke malgraŭ la mallongeco tiu vivo tamen estis riĉa je gravaj eventoj. Lian mallongan vivon (1896-1957) kaj sorton malfaciligis du „ambaŭflanke" plenumitaj militoj, tamen li sukcesis venki en siaj individuaj militoj, resp. homaj bataloj.

Imre *Reviczky* devenis el la norda parto de la historia Hungarlando. Li elektis la profesion de oficiro. En 1916 li finis siajn studojn en la kadetlernejo de *Nagyvárad* (nun Oradea en Rumanio). En la naskiĝvilaĝo, kie vivis ankaŭ slovaka minoritato, la knabeto — krom la alproprigo de la slovaka lingvo — baldaŭ lernis respekti kaj ami aliajn popolojn, poste en Nagyvárad li konatiĝis kun la plej progresemaj tendencoj de tiu epoko.

La juna subleŭtenanto, poste leŭtenanto dum du malfacilaj jaroj en la fronto maturiĝis je plenkreskulo, viro, komandanto, kiu sentis respondecon pri siaj homoj. Li kuraĝe partoprenis en malfacilaj bataloj, intertempe vundiĝis kaj oni ripete distingis lin per ordenoj.

Fine la Aŭstra-Hungara Monarkio disfalis, same ankaŭ la frontoj, kaj sekve de la reciproka malamikeco de la tie vivintaj popoloj Hungario ŝrumpis teritorie kaj fariĝis mortanta. Imre Reviczky konsekvence klopodis plu defendi sian nord-Hungarlandan patrion. Komence li faris tion en iu trupo de la burĝa revolucio, poste ankaŭ en la Ruĝa Armeo de la proleta diktaturo.

La packontrakto de Trianon preskribis, ke Hungario rajtas havi nur malmultnombran armeon, sekve ankaŭ Imre Reviczky ricevis postenon ekster la armeo. Dum dek jaroj li plenumis la preparlaboron de junaj knaboj antaŭ la rekrutigo.

En Hungario la ekonomia krizo de la 30-aj jaroj kaŭzis politikan dekstrenŝoviĝon. La hungara reganta klaso, liganta la landon al la „akso Berlino-Romo", atendis per la helpo de la faŝismaj veziroj la kuracadon de la teritoriaj vundoj, kaj pro tio sklave priservis ilin. La Hitlera frenezo postulis de Hungario la plej grandajn oferojn, kaj trudis ankaŭ la faŝisman ideologion al la lando, kaj tiu ideologio ja erarigis ne malmultajn hungarojn. Imre Reviczky kun si sobreco, honesta patriotismo kaj humanismo bedaŭrinde apartenis al la minoritato, precipe se oni konsideras lian aktivan opoziciemon. Kvankam la novaj landlimoj, fiksitaj en Trianon, tiutempe lian familion kaj ankaŭ lin mem tuŝis tragike, la teritoriaj reaneksoj de 1938-1941 lin ne ebriigis, kaj same ankaŭ venĝemo ne venis en lian kapon kontraŭ slovakoj, rutenoj, rumanoj, kiuj denove fariĝis naciaj minoritatoj en la hungara ŝtato. Eĉ! Vidante la monavidajn, koruptajn, pseŭdopatriotajn mis-

uzojn de la hungara ŝtata administrado, kiuj celis la militistan subtenon de la nazia Germanio kaj diligenton por plifortigi la militon kontraŭ Sovetio, li tutanime decidis protekti la persekutatojn. Tiu sinteno komence elvokis nur la malŝaton de multaj, sed poste signifis ankaŭ la riskon de la propra vivo.

Aŭtune de 1941 la hungaraj organoj pri internaj aferoj deportis multajn judajn familiojn trans la Karpatojn, deklarinte ilin senhejmaj civitanoj. Tie speciala SS-taĉmento amase murdis ilin. Imre Reviczky kiel militista komandanto de la urbeto *Királyhelmec* multajn savis el tiuj mortotrajnoj.

En 1942 ankaŭ lin oni direktis al la fronto, kiel batalionkomandanton. Antaŭ ol atingi la riveron *Don*, oni devigis lin per sia bataliono luktadi kontraŭ partizanoj, kaj li persone ricevis la ordonon totale neniigi tiujn vilaĝojn, kiuj subtenis la partizanojn. Ĉar li rifuzis la plenumon de tiu ordono, oni eksigis lin kaj direktis hejmen, kiel netaŭgan. En lian kvalifikon oni enskribis: maldekstrulo.

La unuan de majo 1943 li transprenis la komandon en *Nagybánya* (nun Baia-Mare en Rumanio) super la tuta Nord-Transilvania laborservo. Lian nomon precipe pro tio kaj de tiam konis multaj miloj da laborservuloj. Laŭ la atestoj de la rememorantoj, li disponis pri ĉ. 40000 judoj, rutenoj, rumanoj, sudslavoj, komunistoj kaj socialdemokratoj. Sian aŭtoritaton li utiligis ne kontraŭ ili, sed por protekti ilin. Estis evidente: pri tiuj senjuĝe kondamnitaj homoj la ofte kruele turmentantaj oficiroj kaj subuloj tute ne ŝuldas respondecon, kaj ne bezonas fari kalkulraporton. Imre Reviczky malpermesis humiligi tiujn homojn, kaj punis tiujn siajn subulojn, kiuj tamen faris tion. Laŭ sia pleja povo li zorgis pri ĉiuj per sanitara provizado, nutrado kaj vestado. Senlace li kontrolis siajn taĉmentojn, kaj en la Transilvaniaj laborlokoj, kaj same en la fronto. La malsanulojn li sendis hejmen, same ankaŭ tiujn, kiuj havis grandan familion. El tiuj li lasis nenion al la fronto. Li kuraĝis permesi porokazan libertempon, forpermeson.

Kiam sekve de la germana okupado komenciĝis la amasa deportado, li sentis tiel, ke la ĉe li plenumata laborservo nun signifas savon de la homoj. Pro tio li envokis por laborservo multajn maljunulojn kaj junulojn, malsanulojn kaj sanulojn, eĉ el la gettoj.

En la menciita libro, enhavanta lian vivkarieron, ĉ. 70 rememorintoj rakontas, kia homo estis Imre Reviczky, kiun fine la sagkrucanoj (hungaraj faŝistoj) arestis kiel patrujperfidulon. Pri kio oni akuzis lin? Jen: li sabotis la militistan evakuon de Nagybánya, malhelpis la eksplodigon de la publikservaj instalaĵoj, ne elliveris al la germanoj la hungaran kaj la rumanan junularon, ktp. Se la rapida ofensivo de la sovetaj taĉmentoj ne okazus, certe oni estus ekzekutinta lin. Tiamaniere li povis atingi, ke miloj da homoj dankeme povis premi lian manon, ke ankaŭ oficiale rekonante liajn meritojn oni promociis lin kolonelo en la demokratia armeo.

En la nova armeo li avide ĵetis sin en la laboron, sed la kulto de personeco interrompis lian agadon: en 1949 oni forigis lin el la aktiva servado — kaj li fariĝis pensiulo. Por doni al li plian frapon, en 1952 oni ĉesigis la pagadon de pensio al li, kaj — por vivi — li povis dungiĝi nur kiel transportlaboristo en karbovendejo... Li ŝovelis kaj portadis karbon por mizera salajro.

Somere de 1956 aperis pri li rekonaj artikoloj — en la Rumania gazetaro. Ankaŭ hejmlande io ŝanĝiĝis: komence de oktobro li rericevis sian kolonelan pension, sed li ne povis ĝui ĝin longe — la 17an de januaro 1957 infarkto mortigis lin.

Lia entombigo estis eble la plej frua manifestiĝo de la hungara popolfronta politiko. Ĝin oficiale organizis la Ministerio pri Defendo, malgraŭ tio, ke laŭ la deziro de la forpasinto la entombigo estis farita kun eklezia ceremonio, kiun plenumis Franciskanaj pastroj. Aldone al tio ĉe la entombigo ĉeestis kaj diris adiaŭan paroladon ankaŭ la ĉefrabeno de la hungara judaro.

István *László*

GRUPA FOTO KUN HISTORIA FONO

István Gáll: OBSEDITA DE L' SUNO. Romano. El la hungara tradukis: Vilmos Benczik. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio. Budapest, 1986. Serio „Hungara Literaturo" n-ro 2. 21 cm. 188 p. Prezo: 18,- ned. gld. (Por Hungario: 65,- Ft)

Tiu ĉi romano prezentas pere de la vivo de jud-devena hungara virino la historiajn tempestojn, kiuj trafis hungarojn inter la jaroj 1944-1970. En tiu periodo amasis animflugigaj sukcesoj kaj tragedioj ne nur en la vivo de la tuto de la nacio: la zigzagoj de la t.n. granda politiko influis ankaŭ la ĉiutagojn de la individuoj. Gáll majstre prezentas ĉion ĉi per streĉe legiga romano, kiu klasiĝas inter la plej bonaj pecoj de la nuntempa hungara prozo.

EKONOMIA TURNOPUNKTO

La 1an de januaro la Budapeŝta filio de la Vagon- kaj Maŝinfabriko „Rába" fermos siajn pordojn. 260 laboristoj kaj 100 oficistoj perdos sian postenon. La kaŭzo de la malfacila decido estas la jena: la filio de longa tempo produktas deficiton. Ĉirkaŭ 10% de la nacia enspezo de Hungario iras subvencie al deficitaj entreprenoj, kaj dume pro manko de investebla mono kreskas la teknologia breĉo inter Hungario kaj la evoluintaj landoj...

Ede Horváth, iam stafanovisto, nun „sukces-homo" kaj „terura infano" de la hungara ekonomio

La gvidantoj de la Hungara Vagon- kaj Maŝinfabriko „Rába" en Győr jam ofte surprizis la hungaran publikon. Frusomere la ĝenerala direktoro de tiu entrepreno — la tria laŭ grandeco, kaj la sesa laŭ sia profitkapablo en Hungario — Ede *Horváth*, iama stafanovista ferlaboristo kaj nuna „sukces-homo" kaj samtempe „terura infano" de la hungara ekonomia vivo elminis kelkajn forgesitajn paragrafojn de la Kodo de Laboro, kiuj ebligas, ke la entrepreno mem difinu, kiam la dungitoj rajtas ferii. Laŭ la tradicioj la dungitoj rajtis elekti por si la konvenan tempon, kaj tiuj tradicioj daŭre vivas ankoraŭ ĉe praktike ĉiuj hungaraj entreprenoj, krom ĉe „Rába". Sed „Rába" estas inter la plej bonaj hungaraj entreprenoj, ĝi pagas pli altajn salajrojn — kaj la decidon de la ĝenerala direktoro la dungitaro, kvankam ne entuziasme, akceptis.

La nova surprizo de „Rába" fine de oktobro estis tio, ke ĝi decidis likvidi sian Budapeŝtan filion, en kiu laboris 260 laboristoj kaj 100 oficistoj. La entreprena konsilio pretas enpostenigi ĉiujn 360 personojn en Győr, promesante pruntojn por loĝejaĉeto en tiu urbo.

Aŭgusta dekreto

Rába faris sian nekutiman decidon, ĉar la produktado en la Budapeŝta filio montriĝis nesanigeble deficita. Leĝa bazo por tiu decido estas aŭgusta ŝtatsekretaria dekreto pristimulado de la likvido de deficita produktado. La koncerna dekreto samtempe enkondukas t.n. *dungiĝan monhelpon* por tiuj personoj, kiuj sekve de la likvido de deficita produktado perdas sian postenon kaj ne tuj trovas novan. Laŭ kompetentaj funkciuloj ne pro pudoro oni ne nomas tiun monhelpon *senlaborula alimento*: la



La Budapeŝta filio de „Rába" — la unuan de januaro 1987 fermos siajn pordojn

„dungiĝa helpo" deziras efike celi la redungiĝon de la homoj, perdintaj sian pli fruan postenon.

Estas fakto, ke en la nuna momento malmultaj hungaraj dungitoj vidas proksima la danĝeron de maldungiĝo, ĉar la nunaj impostaj kaj aliaj reguloj enorme soifigas la entreprenojn je homa laborforto: momente en Hungario estas 75400 vakantaj postenoj, kaj dum la lastaj tri monatoj entute nur 4613 personoj turnis sin al la laborperaj oficejoj, kaj 3644 el tiuj dum malpli ol 30 tagoj trovis taŭgan novan postenon.

Du malbonaj jaroj

La hungara ekonomio inter 1979-1984 atingis plaĉajn rezultojn — almenaŭ koncerne la bilancon de la ekstera komerco. Sed la jaro 1985 jam ne alportis la deziritajn rezultojn, kaj laŭ la prognozoj la kuranta jaro malsuperos la antaŭan. La pozitiva bilanco de la ekstera komerco ŝuldiĝis ankaŭ ĝis nun ne unuavice al la kresko de la eksporto, sed al la drasta limigo de importo, kio siavice nur kreskigis la teknologian breĉon inter Hungario kaj la evoluintaj landoj. (La strebado de la ŝtato limigi la importon ne preteratentas eĉ tiel etajn aferojn, kie' la svisa papero de la kovrilpaĝoj de HV. En la momento de la kompostado de tiu ĉi artikolo daŭras la marĉandado kun la koncerna ŝtata instanco. La rezulton vi povos konstati ĵetante rigardon al la kovrilo...)

La jaro 1986 ekis kun plagaj eventoj. Unue komplete forbrulis la Mikroelektronika Entrepreno, kaj tio preskaŭ plene knokaŭtis la dum jaroj malfacile naskitan registaran mikroelektronikan programon. Tion sekvis la Ĉernobila tragedio, kiun la landoj de la Komuna Merkato bele eluzis por kelktempe forteni la hungarajn agrikulturajn produktaĵojn disde sia merkato, senigante tiel Hungarion je enspezoj de multaj dekmilionoj da dolaroj. La Ĉernobil-psikozo kaŭzis malpliiĝon de la enspezoj ankaŭ en la turismo. Por kompletigi la vicon venis la ekstreme sekaj somero kaj aŭtuno, kiuj verŝajne havos sian negativan influon ankaŭ al la venontjara rikolto, kaj, ĉar agrikulturaj varoj ludas ŝlosilan rolon en la hungara eksporto, same al la venontjara bilanco de la ekstera komerco.

Malsanoj en 17 punktoj

Tamen, ne en la supre skizitaj damaĝoj oni devas serĉi la esencajn kaŭzojn de la ekonomiaj problemoj. Antaŭ kelka tempo la internacie rekonata hungara ekonomikisto János *Kornai* kun sia kolegino Ágnes *Matits* analizis la bilancojn de ĉiuj hungaraj entreprenoj en la jaro 1982. La analizo pruvis, ke la ŝtata administracio tro profunde influas per impostoj kaj subvencioj la realan financan situacion de la entreprenoj. La influo havas klare samniveligan efikon, kaj tio rekte malstimulas la entreprenojn fari pli profitdona sian produktadon. La modelo estas simpla: la ŝtato per impostoj forprenas la monon de la profite laboran-

La Mikroelektronika Entrepreno — antaŭ la forbrulo



taj entreprenoj, kaj donas ĝin subvencie al tiuj, kiuj havas deficiton. El 14 deficitaj entreprenoj post la centra redistribuado de la rimedoj nur unu sola restis tia, kaj el la 24 alte profitantaj entreprenoj nur 5 sukcesis resti tia post la ŝtata interveno. (Vidu la enkadritan tabelon!)

Kornai kaj lia kolegino resumas en 17 punktoj la negativajn influojn de la tiamaniera ŝtata redistribuado de la nacia enspezo. Jen, specimene kelkaj el la dek sep: (...) 2. Sekve de la redistribuado la efektiva profito de la entreprenoj signife diferencas disde la origina profito. (...) 4. Per la redistribuado oni samniveligas la profitojn malalte. 5. Ne ekzistas demonstrebla rilato inter la likvido de entreprenoj kaj ties (mal)profiteco. (...) 7. La profiteco de la entreprenoj estas sendependa de ilia pli frua investa aktiveco. (...) 10. Ne ekzistas demonstrebla rilato inter la profito kaj la salajronivelo de la entreprenoj. Eĉ: oni povas konstati, ke tiuj entreprenoj, kie la salajronivelo estas pli alta, ordinare havas malaltan profiton. (...) 15. La grandaj entreprenoj pli facile ricevas ŝtatajn investajn rimedojn, kaj ĝuas kelkajn favorojn koncerne la impostpagadon.

Kiel plu?

Estas evidente, ke necesas kapitalo por plibonigi la teknologian nivelon de la hungaraj varoj, ja sen tio iliaj mondmerkataj pozicioj daŭre malboniĝos. Sed kie trovi tiun monon?

Lastatempe per emisio de ŝtate garantiitaj(?!) entreprenaj valorpaperoj oni faris provojn enigi privatajn ŝparaĵojn en la moncirkuladon de la ekonomio. Tiuj provoj alportis ŝatindajn rezultojn, tamen estas evidente, ke tiuj sumoj ne povas signife kontentigi la kapitalsoifon de la investa aktivado. Alia ebla fonto estas eksterlandaj pruntoj, sed pro la jamaj altaj eksteraj ŝuldoj de Hungario oni povas uzi tiun fonton nur singarde.

La plej evidenta fonto estas tamen la liberigo de tiuj sumoj, kiujn la ŝtata buĝeto elspezas por la subvenciado de dificita produktado. Se la buĝeto povus almenaŭ parte liberiĝi de tiu ŝarĝego (ĉ. 10% de la nacia enspezo iras subvencie al deficitaj entreprenoj), ĝi povus mildigi la impostojn, kaj la profite laborantaj entreprenoj havus eblon renovigi sian teknologion.

Verŝajne tiu konsidero naskis la artikolkomence aludita n aŭgustan dekreton, kiun la entrepreno „Rába" ruze eluzis por fordoni balaston.

Verŝajne nur malmultaj el la 360 personoj transloĝiĝos al Győr, Ede Horváth do probable senpage „liberiĝis" de 360 deficiton produktantaj homoj — la Budapeŝta soifa labormerkato tuj ensuĉos ĉiujn, kiel seka spongo akvon. Sed estas klare, ke ne nur 360 personoj produktas deficiton en la hungaraj fabrikoj. En la nuna momento ne estas antaŭvideble, kiom da aliaj direktoroj sekvos la ekzemplon de „terura infano" de Győr. Cetere, estas du kialoj, kiuj pravigas singardemon ĉi-kampe. La unua estas eventuala senlaboreco, kiu metus teruran moralan ŝarĝon sur la ŝultrojn de la hungara socio. (Eĉ se el pura ekonomia vidpunkto tio ne signifus danĝeron, eĉ, havus pozitivajn aspektojn.) La dua kialo estas la abrupta formalapero de la varoj, kiujn produktas la likvidotaj deficitaj entreprenoj aŭ filioj. Tiujn varojn oni devos importi, kaj tio — almenaŭ provizore — negative influos la bilancon de la ekstera komerco.

Tamen, kun necesa singardemo oni nepre devos sekvi la ekzemplon de „Rába", ĉar se ne okazos tiel, la prezon de la prokrasto pagos ne nur la nemoviĝemaj entreprenoj, sed dek milionoj da hungaroj — kiel okazas ĝis nun.

Vilmos *Benczik*

Kategorioj laŭ la profiteco	Proporcioj de la entreprenoj apartenantaj al la diversaj kategorioj	
	antaŭ la redistribuado de la profitoj fare de la ŝtato	post
Deficita	14%	1%
Kun malalta profito	22%	77%
Kun normala profito	40%	17%
Kun alta profito	24%	5%

Desegnaĵoj de Tamás Bakos

NACIA TEMO — INTERNACIA MUZIKO

La rock-opero en Hungario

Ĉu oni rajtas murdi, por ke fortikaĵo staru? Jen la metafora etika demando, kiun lanĉas praa popola balado, kaj kiun relevas la aŭtoroj de sukcesa hungara rock-opero. Ĉu oni rajtas oferi aliajn por celo kiu estas (aŭ ŝajnas esti) ĝusta? La demando estas daŭre aktualega: ni pensu pri soldatoj senditaj morti en foraj landoj, aŭ pri teroristoj, por kiuj morta homo servas kvazaŭ propagandilo...

En la komenco ĝi daŭris nur du-tri minutojn. Maksimume kvar. Poste aperis ensembloj kiel *The Beatles* aŭ *Deep Purple*, kaj ĝi ekokupis tutan flankon de disko *(Abbey Road; Concerto for Group and Orchestra)*. Sed ĝi, la rock-muziko, ne kontentiĝis je tiel malvastaj kadroj. Ĝi revis pri teatra scenejo, sopiris pri plurhoraj spektakloj. Ĉu la rock-muziko estas malserioza, esprime malriĉa artospeco? Sed ja ankaŭ Mozart ne povis koncepti tion saman en duminuta marŝo, kion en sia *Magia Fluto*. La rock-muziko troviĝis antaŭ granda provo: ĉu ĝi kapablas transdoni tiom da intelekta mesaĝo, kiom la klasika muziko? Tion — kvankam eblas diskuti pri la valoro de la unuopaj verkoj — konvinke pruvis por ni *Hair* de McDermot-Rado-Ragni, *Jesus Christ Superstar* de Webber-Rice, *Tommy* kaj *Quadrophenia* de The Who.

Ĉu la hungara rock-muziko malfrue eniris tiel promeshavan etapon de la internacia muzika kulturo? Jes, ĉar la influoj, kiel kutime, trafis nin nur post konsiderinda tempopaso: *Hair* atingis la hungarajn kinejojn en 1980, *Jesus Christ Superstar* en 1983. Rock-Teatro fondiĝis en Budapeŝto nur antaŭ kelkaj jaroj. Sed tiu malfruo montriĝis ankaŭ avantaĝo: anstataŭ rapida kaj senkritika transpreno aŭ imito de okcidentaj modeloj povis kreiĝi speciale hungaraj rock-operoj, el inter kiuj almenaŭ du: *Kőműves Kelemen* (Masonisto Kelemen) kaj *István, a király* (Stefano, la reĝo) eltenas ian ajn internacian komparon.

Jam en 1973 estis muzikigita por teatro romaneto de la konata hungara verkisto, Tibor Déry, *Fikcia raportaĵo pri Usona pop-festivalo*. Malgraŭ tio, ke la altnivelan muzikon komponis pioniro de la hungara rock-muziko (nuntempe estro de la ensemblo LGT), Gábor Presser, tiu teatraĵo pli ĝuste povas nomiĝi *musical*. Ankaŭ la temo, kiel montras la titolo, estis ĉerpita ne pure el hejmaj fontoj. Pli malfrue, kiam la orientiĝo al la okcidentaj stiloj montriĝis sensukcesa sur la internacia merkato, en nia tuta rock-movado plifortiĝis la tendenco reiri al la fontoj hungaraj, popolaj. La plej elstara figuro de tiu tendenco estis Levente Szörényi (iama estro de la legenda ensemblo Illés), sur kies disko, titolita karakterize *Reveno hejmen* (1980), eksonas eĉ la mezepoka blovinstrumento, nomata *„tárogató"*... Sur tiu disko aŭdeblas la impresa balado pri Masonisto Kelemen, kiu antaŭanoncas la venontjaran samtitolan rock-operon.

La baza temo de *Masonisto Kelemen* — la masonistoj oferdonas la edzinon de unu el ili por la sukceso de sia laboro — estas komuna motivo en pluraj Balkanaj mitaroj. (La albanan varianton ekzemple utiligis la fama franca verkistino Marguerite Yourcenar en la novelo *Le lait de mort* (La lakto de morto), kiu gloras la mirindecon de la patrina amo: la lakto, filon nutranta, ne elĉerpiĝas el la mamoj de la enmurigita, mortinta virino.) La motivo venis en Hungarion el la rumana kultursfero, tial ĝi troveblis plejparte en la regiono Transilvanio (nuntempe en Rumanio), kie ankaŭ Zoltán Kodály notis ĝin dum sia kolekta vojaĝo. Pli nove, en 1948-49, verkis pri la temo Imre Sarkadi, sed lia dramo, sur kiu la rock-opero baziĝas, restis en fragmentoj. Tiun draman torson kompletigis kaj muzikigis Levente Szörényi, János Bródy (iama samensemblano kaj ĉiama kunlaboranto de Szörényi) kaj Csaba Iványka.

La masonistoj, kiuj kontraktis pri konstruo de la fortikaĵo de Déva, vane laboras



La simbolo de la homa krueleco... La legenda fortikaĵo de Déva — nun

jam tutan monaton: La muro ree kaj ree disfalas. Kio mankas? Laŭ Kelemen, ilia estro, mankas la volo, la animo. Sed kiel fortigi, kiel kuraĝigi la masonistojn? Boldizsár, lia kunulo (kaj kontraŭulo) asertas, ke la malsukceson kaŭzas malbonaj spiritoj, vagantaj sur la monto. Obskurajn fortojn nur per ofero eblas pacigi: necesas enmurigi la edzinon de unu el la masonistoj, tiun, kiu venos la unua. Kelemen devas konsenti kaj fine lasi, ke ili mortigu ĝuste lian edzinon. Ĉu lia ofero estis vana? Kiam maljunulo, lia samvilaĝano, sciigas lin pri tio, ke mortis lia senpatriniĝinta filo, kaj la vilaĝo ekskomunikis lin, en Kelemen estiĝas dubo: ĉu indas tiom suferi kaj oferi por tiu senviva ŝtonamaso, la fortikaĵo, kiu ja iam, eĉ se post jarcentoj, malaperos? „Ĉu licas murdi, mortigi homon, por ke la fortikaĵo staru?"

Boldizsár estas ne superstiĉema homo, sed cinika raciulo: se la aliaj volas kredi je misteraj detruaj potencoj, ili ja devos kredi ankaŭ je la repaciga forto de la homofero. Laŭ li la fortikaĵo devas finkonstruiĝi nur ĉar la masonistoj entreprenis la konstruadon; kaj la homojn laborigi eblas per ruza manipulado. Por Kelemen la kreado mem estas pli grava ol la kreaĵo („ni naskiĝis por krei", li diras), kaj la enan forton de la kreado devas doni kredo. Li mem havas tiun kredon, sed ne povas ĝin transplanti en aliajn. Tial li fine devas akcepti la ideon de Boldizsár pri la homofero, kaj per tio, en pli vasta senco, la aserton, ke „la celo pravigas la rimedon". Komence li dubas pri tio, ĉu krimo povas esti pravigebla, fine li ekdubas pri la praveco de la celo mem. La fortikaĵo, anstataŭ fariĝi laŭdo de la krea laboro, restas kiel terura monstro, pruvo de la homa krueleco, sur la dezerta montopinto.

La demando, ĉu oni rajtas oferi ne sin mem, sed iun alian por celo, kiu estas aŭ ŝajnas

MASONISTO KELEMEN
(Popolbalado)

Jen ekiris vojon dekdu masonistoj,
Ili iris, iris al la urbo Déva,
Tie ekmasonis Déva-burgon altan.
La mason' dumnokta falis ĝis tagmezo,
La mason' dumtaga falis ĝis noktmezo.

Masonist' Kelemen metis leĝon jenan:
„Kies ajn edzino nun unua venos
Porti la tagmanĝon,
Ni ŝin mole prenu, ĵetu en la fajron,
La korpcindrojn karajn ni en kalkon miksu,
Altan Déva-burgon ni per tio fiksu."

Iris, jen ekiris edzineto lia,
Kun tagmanĝo venis, voje ŝi rapidis,
Masonist' Kelemen veni ŝin ekvidis.
„Dio, mia Dio, antaŭ ŝi estigu
Du sovaĝajn bestojn, eble ŝi sin turnos."
Ŝi evitis ilin.

„Dio, mia Dio,
Antaŭ ŝi estigu densan ŝtonopluvon,
Eble ŝi sin turnos."
Ŝi evitis ilin.

„Bonan tagon, bonan! dekdu masonistoj!
Dio, mia Dio, kio al vi estas,
Je salut' trifoja eĉ ne resaluti? "
„Tiun leĝon faris via edzo kara:
Kies ajn edzino nur unua venos,
Ni ŝin mole prenu, ĵetu en la fajron,
La korpcindrojn karajn ni en kalkon miksu,
Altan Déva-burgon ni per tio fiksu."

Ŝi ĝin kredis ŝerco je l' unua diro,
Ŝi ĝin kredis farso je la dua diro,
Ŝi ĝin kredis vero je la tria diro.

„Ho atendu iom, dekdu mortigistoj!
Ho atendu iom, lasu hejmeniri,
Lasu min la lastan adiaŭon diri,
Adiaŭon al la rond' amikinara,
Adiaŭon al la eta filo kara."

Kelemen-edzino tiam hejmeniris,
Kaj ŝi sian lastan adiaŭon diris,
Adiaŭon al la rond' amikinara,
Adiaŭon al la eta filo kara:
„Ho, filet', ne ploru!
La virinoj bonaj vin ja nutros mame,
La infanoj bonaj vin ja lulos ame,
La ĉielaj birdoj ĉirkaŭ vi flugante
Al vi bele ĉirpos, vin dormigos kante."
Kaj al Déva-urbo ŝi reiris plore.

„Paĉjo, kara paĉjo, kie estas panjo? "
„Ho, ne ploru, filo, venos ŝi vespere."
La vespero venis, panjon li ne havis.
„Paĉjo, kara paĉjo, kie estas panjo? "
„Ho, ne ploru, filo, venos ŝi matene."
La mateno venis, panjon li ne havis.
Mortis panjo, filo...

El la hungara: K. Kalocsay

Imre Sarkadi
(1921-1961)

MASONISTO KELEMEN
(Fragmento)

KELEMEN: *Hieraŭ, kiam vi teruris la homojn, ili vidis sorĉistinojn sur ĉiu arbopinto, kaj ili estus pretaj oferdoni sian saviĝon nur por povi trankviliĝi je io — tiam tiu ĉi marĉando estis stultaĵo. Sed nun, matene, kiam mi repensas ĝin, ne plu ĝi estas stultaĵo. Kreadon neniam donis la naturo senpage. La posteuloj paŝis sur la korpojn de falintoj en batalo, por aliri novajn atingaĵojn.*

BOLDIZSÁR: *Vi ekzaltiĝas, Kelemen. Por vi ja estas facile, temas ne pri via vivo. Nur pri vivo ĝenerale.*

KELEMEN: *Ne pri vivo. Pri ofero. Pri tio, ke ni oferdonu ion por la verko. La samon mi diris hieraŭ: ni devas aldoni nian animon. Ankaŭ tio, kion vi proponis, estus certa maniero de tio. La tremo de la tagoj pasantaj: eble mia edzino venos la unua. Kaj la tremo de malkuraĝo: ĉu ni aŭdacos fari tion? La tremo de la Kristana dogmo: ĉu licas mortigi homon? Mortigi homon por fortikaĵo? Sed verdire la demando tekstas ne tiel, sed alie: ĉu valoras unusola homo tiom, kiom aĵo kreita por longaj, grandaj tempoj. Kaj ni devas konvinki ĉiun laŭ ties propra kredo, ke nia tasko estas — krei.*

El la hungara: István *Ertl*

Sceno el „Masonisto Kelemen"



ĝusta, estas eterna (en la Biblio tion ekzempligas la historio de Abraham kaj Isaako) kaj tiel ankaŭ aktuala: ni pensu nur pri la maljustaĵoj de la 50-aj jaroj en Hungario kaj en aliaj landoj; pri teroristoj, por kiuj morta homo servas kvazaŭ propagandilo; pri grandaj potencoj, kiuj sendas siajn soldatojn morti en proksimaj kaj foraj landoj...

Tiu demando pri la praveco, sankteco de celo kaj rimedo ĉiam metiĝas en la homa historio. Alia, pli nova kaj grandsukcesa hungara rock-opero, *Stefano, la reĝo*, prezentas la dilemon en modela historia situacio: malkontentaj amasoj turnas sin kontraŭ la reprezentantoj de la potenco, kiujn oni apogas ankaŭ el eksterlando.

Stefano, la unua hungara reĝo, heredis de sia patro, Géza, landon sur vojkruciĝo. La hungaroj, alvenintaj antaŭ nur cent jaroj en la Karpatan basenon, grandparte estis tiam paganoj, formante fremdan parton en la Kristana korpo de Eŭropo. La demando estis: ĉu resti paganoj, riskante dangeran bataladon kontraŭ Kristanaj landoj, aŭ kristaniĝi, riskante la perdon de la identeco, kunfandiĝon kaj eble subiĝon al la potenca German-Romia Imperio? Géza jam elektis la duan vojon, edzigante sian filon al bavara princino, kaj vokante misiistojn en la landon. Li heredigis la reĝan tronon al sia filo Stefano, fidela daŭriganto de la patraj klopodoj, sed ĝin volis ricevi ankaŭ la onklo de Stefano, Koppány, kiu, en la nomo de la praaj tradicioj, kontraŭbatalis la kristanigon, vidante en ĝi germanigon; ankaŭ la popolo malŝatis la plimultiĝantan germanan misiistaron. Stefano, helpita de germanaj kavaliroj, fine venkis Koppány-on, kaj, por doni fortimigan ekzemplon, li ordonis distranĉi ties korpon je kvar partoj.

La rock-opero, verkita laŭ dramo de nuntempa hungara verkisto (*Jarmilŝanĝo* de Miklós Boldizsár), atingis neniam antaŭe spertitan sukceson, kaj ne nur inter la junularo. Hungaraj elmigrintoj en Usono aŭskultis ĝin dum diservo; sesdekjaruloj la unuan fojon

Sceno el „Stefano, la reĝo"

en sia vivo elspezis monon por rock-disko. Ĝiajn sep subĉielajn prezentadojn en aŭgusto de 1983 spektis entute 100 000 homoj; la filmon tie turnitan jam antaŭ la oficiala premiero vidis 105 000, en la unua monato post la premiero 415 000 homoj. Samtempe, dum duonjaro, vendiĝis 250 000 duoblaj diskoj kun ĝia muziko. (Ĉio ĉi en lando kun dek milionoj da loĝantoj!)

Kio klarigas tian sukceson? Unue, la kunlaborintaro. La muzikon komponis — kompreneble — Levente Szörényi; la tekstojn, kiuj alte superas la mezajn rock-ŝablonojn, verkis János Bródy; la filmon reĝisoris Gábor Koltay, kiu jam kun simila sukceso filmigis la adiaŭan koncerton de la ensemblo Illés, reunuiĝinta por tiu ĉi sola fojo. La geaktoroj-gekantistoj estas ne malpli konataj. Por ne mencii ĉiujn: Ŝarolt-on, la patrinon de Stefano personigas Katalin Berek, esperantista aktorino (ŝi deklamas dek poemojn sur la esperantlingva disko *Bukedo el la hungara poezio*); Koppány-on ludas kun granda vervo la plej elstara figuro de la hungara „hard-rock", Gyula Vikidál; Torda, la ŝamano fariĝas nerezistebla en la plenumo de Gyula „Bill" Deák, la plej originala hungara *blues*-kantisto; Laborc-on, ribelantan sinjoron aperigas Feró Nagy, vivanta legendo de la hungara „punk" kaj avangardo, eks-estro de la multajn konsterninta ensemblo Beatrice (nuntempe li estas surdiskiganta sian varianton de Hamleto). Sed la plej grava faktoro en la sukceso estis la muziko mem, kiu kunfandas en unuecan tuton nekredeble multajn muzikspecojn: hungaran folkloron, Gregorian ĉanton, „hard" kaj „soft" rock-muzikon, klasikan grand-orkestran sonadon — kaj eĉ ebrian kantaĉon de la hungaraj sinjoroj.

Tamen ankaŭ kritikeblaj flankoj ne mankas. La opero tro ofte memorigas pri la klasika *Jesus Christ Superstar* per sia problemaro (rilato inter estro kaj estrita amaso, kontraŭstaro de du pravoj, ŝajne ambaŭ ĝustaj, tiuj de Jesuo kaj Judaso, resp. de Stefano kaj Koppány) kaj per sia dramaturgia konstruo (eblus paraleligi plurajn partojn kaj kantojn, ekz. la himnojn al Jesuo — *Hosana* — kaj al Stefano — *Stefano, nia princo.*) Sed pli tikla estas la demando, kiu ĉiam metiĝas pri verkoj, kiuj traktas grandajn eventojn de la pasinteco: kiagrade licas ŝanĝi la historian veron? La verko prezentas pli simpatiaj la ribelulojn (eble ĉar ilin ludas pli vervaj kantistoj-aktoroj), dum Stefano ŝajnas bonvola, sed senforta pupo en la manoj de sia memfida patrino.

Radio Budapest – en Esperanto

Intervjuo kun Pál Felső

Kvankam la Esperanto-programo de la Hungara Radio estas preparata en Pécs, ĝi aperas en la tabelo de Esperanto-elsendoj kiel disaŭdigo de Radio Budapeŝto. Kial?

Ĉar ĝi estas integra parto de la 3a programo de Radio Budapeŝto. Ĉiuvendrede, je la 13.30 la antaŭtagmeze finpretigita Esperanto-programo iras per kablo de la regiona studio Pécs al la Budapeŝta centro de Hungara Radio, kie oni surbendigas la tuton. Dimanĉe, je la 13.05 oni puŝas la taŭgan butonon en la Budapeŝta radiocentro, kaj per tio samtempe 11 elsendoturoj komencas emisii la Esperanto-elsendon. Por kompreni ĉi tiun situacion, certe necesas iom da klarigo. En 1985 la kompetentuloj de la Hungara Radio decidis pri la enkonduko de Esperanto-disaŭdigoj. Laŭ onidiroj tion ni povas danki grandparte al iu altranga politikisto, kiu efike elpaŝis ĉe la gvidantoj de la Hungara Radio. La eksterlanden direktitaj Esperanto-disaŭdigoj pro iuj kaŭzoj ne estis efektivigeblaj, sed en la 3a programo de la hungarlingvaj elsendoj montriĝis ebleco. Bedaŭrinde, ĝi estas ultrakurtonda dissendo, kiu kapteblas nur en Hungario kaj en la apudlimaj regionoj de la najbaraj landoj.

El Pécs tra Budapeŝto — parolas Pál Felső

En la Budapeŝta centro de la Radio ne estis trovebla Esperanto-parolanta profesia radiožurnalisto, kiu povus prizorgi la elsendojn. Finfine venis en ies kapon, ke en Pécs jam depost kelkaj jaroj mi havas Esperanto-programojn en la turisma ĉefsezono. Tial mi iĝis la redaktoro de la Budapeŝtaj Esperanto-disaŭdigoj, kvankam eĉ skribe mi petis, ke oni re-

La spektanto povas pense aliĝi al iu ajn flanko: la malsukcesintajn ribelintojn simpatiigas iliaj honestaj intencoj; la reĝon kaj lian ĉirkaŭantaron pravigas la historio, kiun koni ni havas la avantaĝon. La *katarso* (t.e. „animpuriĝo", estetika fakvorto) estas certigita... la tria kritikebla trajto estas tiu, kiu samtempe ne malmulte kontribuis al la sukceso: la problemo de la nacia historio, aktualeco kaj anakronismo. La hungara historio riĉas je similaj nacidividaj situacioj: ni pensu pri 1867 (la jaro de la t.n. „kompromiso" inter la hungaraj regantaj tavoloj kaj Aŭstrio), pri 1919 (la jaro de la Hungara Konsilia Respubliko), pri 1944-45 aŭ pri 1956. Tiel la eblecoj de paraleligo ne malmultas. Ni devas refoje laŭdi la lerton de la verkintoj, kiuj lasas al ni la elekton. (La enkonduka kanto de la opero tekstas: „Morgaŭ iu devos elaĉeti ĉi tiun mondon. Diru, kiun vi elektus?") Sed anstataŭ ni elektas la historio, ni povas nur kompati la malvenkintojn. Aliaj eblaj vojoj de la historio (pri kies ebleco, cetere, oni povus diskuti, se entute tia diskuto havas sencon en la historio-scienco) montriĝas nur satirece, en la kanto de ŝamano Torda: „Ni venkos ĉe Mohács (loko de katastrofa malvenko en 1526 kontraŭ la turkoj), Dózsa (estro de malsukcesinta kamparana ribelo en 1514) fariĝos nia reĝo, ni estos granda potenco tra centjaroj..." Pro tiaj anakronismoj, pro la fina himneca kanto („Bela Hungario, dolĉa patrio nia") kaj pro la giganta hungara flago, kiu aperadis je la fino de la prezentadoj, oni akuzis la operon ankaŭ pri naciismo, povanta ofendi la sentojn de la najbaraj popoloj. Sed ĉu estas pli ĝuste prisilenti grandajn historiajn turnopunktojn, aŭ reekzameni ilin laŭ ĉiam pli novaj, eĉ se ne ĉiam senerataj konceptoj?

La verkoj *Masonisto Kelemen* kaj *Stefano, la reĝo* signas tian etapon en la evoluo de la hungara rock-opero kaj rock-muziko ĝenerale, kiun atingi estis granda faro, kaj kiun superi estos malfacila, sed espereble al laboro kuraĝiga tasko.

István *Ertl*

konsideru la decidon, ĉar ne estas perfekta solvo, se el iu provinca urbo mi redaktas la tutlandan programon. Cetere, ĉi tiun taskon mi plenumas paralele kun miaj ĝisnunaj laboroj ĉe la hungarlingva sekcio de Radio Pécs, kiel redaktoro kaj intervjuisto.

Viaj Esperanto-programoj kutime konsistas el du partoj: turismaj kaj movadaj eroj. Ĉu ne leviĝis ankaŭ aliaj ideoj, kiam temis pri la starigo de la elsendoj?

Miaj ĉefoj donis neniajn instrukciojn. Ili senrezerve akceptis miajn surpaperigitajn proponojn pri la redaktaj principoj. (La samajn principojn mi aplikas redaktante la somerajn regionajn Esperanto-disaŭdigojn de Radio Pécs.) Evidente, la Esperanto-elsendoj devas okupiĝi pri movadaj temoj. En la alia parto de la programoj mi ŝatus servi al la eksterlandaj turistoj per praktikaj informoj. Ĉi tiujn informojn parte mi mem kolektas, sed plejparte mi utiligas la helpon de la turisma informservo TOURINFORM. La kontaktoj kun ĝi ekestis nature per la helpo de d-ro Márton Lengyel, esperantista vecprezidanto de la Nacia Turisma Oficejo.

De tempo al tempo aperas ankaŭ poemoj kaj kantoj en la programoj. Ĉu vi ne povus disaŭdigi tiajn erojn pli ofte?

Oni nepre devas preni en konsideron, ke ĉi tiujn programojn vole nevole aŭskultas ankaŭ neesperantistoj, kaj antaŭ neesperantista publiko mi pretas prezenti nur tiujn Esperanto-diskojn kaj -kasedojn, kiuj digne reprezentas nian kulturon. Bedaŭrinde la plimulto de la Esperanto-registraĵoj pro la malalta arta aŭ teknika nivelo diskreditus la Esperanto-kulturon, se mi enmetus ilin en la programon. Aliflanke, la ĉefa tasko de la programo estas, ke ĝi informu la aŭskultantaron, kaj mi ne emas ellasi la turismajn kaj movadajn informojn, nek la intervjuojn. Sekve, malofte restas tempo por kanto aŭ poemo.

Ĉu ne eblus plilongigi la elsendotempon?

Laŭ mia scio ni apenaŭ havas ŝancon, sed ŝajnas al mi, ke la semajnaj 10 minutoj estas la maksimumo, prizorgebla de unupersona redakcio. Kaj ne forgesu, mi estas ne nur redaktoro, sed ankaŭ intervjuisto, parolisto, administranto kaj tajpisto de la Esperanto-redakcio. La eventualan plilongigon al 15 minutoj — sub la nunaj kondiĉoj — mi povus imagi nur tiel, ke en la plusaj 5 minutoj ni disaŭdigu lingvokurson.

La komence 5-minutaj elsendoj ekde marto fariĝis 10 minutaj. Kiamaniere oni sukcesis atingi ĉi tiun plilongigon?

Tutcerte pro la kontentiga nombro de perleteraj reagoj kaj petoj de la aŭskultantoj. Kvankam oni ne petas de mi, sed je la fino de ĉiu monato mi tamen informas miajn ĉefojn pri la ricevitaj leteroj kaj plusendas al ili ĉiujn proponojn de la aŭskultantoj, ja mi ne kompetentas pri la plilongigo de la elsendotempo nek pri la uzo de alitipaj frekvencoj. En la monata resumo mi neniam forgesas raporti pri la kritikoj, ekz. pro iu lingva eraro, ja tiuj kritikoj pruvas, ke oni tre atente aŭskultas la elsendojn.

Ĉu ne necesus organizi leterkampanjon aŭ alimaniere instigi esperantistojn, por ke ili pli multnombre skribu al la redakcio?

Principe mi estas kontraŭ la kampanjoj. Mi ŝatus akiri la subtenon de la esperantistaro pere de la enhavo de la programoj. Mi estas tre danka al ĉiuj skribintoj, pro tio mi respondas ĉiun leteron. Samtempe mi havas nenian plendon kontraŭ tiuj, kiuj „nur" aŭskultas kaj ne skribas, ja la esperantistaro estas superŝutita per plendoj kaj petoj, kaj pro tio la plendoj kaj petoj estas senefikaj. Mia gvidprincipo en la laboro estas, ke mi plenumu informan servon al la aŭskultantoj, kaj laŭ la ebloj la 10 minutoj estu kiel eble plej bone utiligataj. Do, unuavice mi devas servi al la aŭskultantaro, kaj ne inverse.

Ŝatinda sinteno, bedaŭrinde malofta. Tamen almenaŭ malkovru la indikojn pri la ondolongoj, kaj la adreson de la redakcio...

La elsendoj okazas pere de 11 modulitaj frekvencoj, inter 67,04 kaj 72,08 megahercoj. La adreso de la redakcio: Esperanto, Radio Pécs, Pf. 200. H-7601.

Dankon pro la intervjuo.

V.B.

PAJLO AŬ LUMO?

Antaŭ nelonge mi aŭdis fabelon pri orienta reĝo, kiu havis du filojn. Kaj la fabelo temis pri la du vortoj, kiuj estas legeblaj en la titolo.

La maljuna reĝo sentante la alproksimiĝon de la morto, ordonis al si la du filojn, por fari testamenton, kaj decidi, al kiu filo lasi la regadon? Kiu el ili estas pli saĝa?

En la proksimo estis granda groto malhela. La reĝo al ambaŭ filoj donis la saman sumon el sia mono, kaj ordonis:

— Per tiu ĉi sumo vi aĉetu ion, per kio estas plenigebla la groto!

La pli aĝa filo iris al la proksimaj vilaĝoj kun multaj servistoj kaj ĉaroj, kaj iris de domo al domo aĉeti pajlon, kiom oni donis al li por la ricevita sumo.

La servistoj ĉaron post ĉaro plenigis per la aĉetita pajlo. Ŝvitante ili portis ĝin al la ege granda groto. Ili provis plenigi la groton laŭ la ordono de la reĝo... Sed la pajlo ne sufiĉis por tio.

Kion faris la pli juna filo? — Li iris en la bazaron, kaj aĉis de la lampofaristo belegan meĉon, faritan el kupro, kaj oleon. Portis la pretigitan meĉon en la groton, kaj metinte en la mezon, bruligis ĝin... Kaj la ege granda groto tuj pleniĝis per brila lumo...

Kaj per kio plenigas Vi la malluman spacon de Via vivo?

Tibor *Bessenyei*

Mejlo-ŝtona bukedo

Bukedo de la hungara poezio. Poemoj el Hungara Antologio. Du grandformataj diskoj. Entuta ludotempo: 110 minutoj. Reĝisoris: István Iglódi. Redaktis: Vilmos Bencsik. Eldonis: Hungaroto, Budapest, 1985. Prezo: 36,- ned.gld. (Por Hungario: 140,-Ft)

La bukedo prezentiĝas unuavice en sobra nigro, sed blanka plumo elvokas delikatecon, kiun fortigas la or-litera disko-titolo. Dorse sur la diska kovrilo ni trovas koncizan enkondukon de Vilmos Benczik, la redaktoro de la projekto. Tie, apogata de cito de Örkény, („Pardante al eksterlandanoj pri la hungara poezio, ĉiam mi estas embarasita. Mi sentas min en la pozicio de homo, kiu havas en la poŝo la plej grandan diamanton en la mondo; sed kiam li elpoŝiĝas ĝin, la diamanto disvaporiĝas...") li klarigas la malfacilaĵon por hungaroj komuniki la valoron de sia poezio al la ekstera mondo kaj insistas pri la eksterordinara rolo de la poezio el inter la hungaraj art-formoj. Kiel nova observanto de la hungara vivo, la recenzanto povas atesti, laŭ la regimentoj de alt-kvalitaj libroj, kiuj ŝtopas minimume ĝisporde hungarajn hejmojn, kaj la superabundo de gazetoj ofertataj surstrate, la legovoremon kaj literaturamon de la hungara popolo. La kvanto de specife poeziaj libroj proponataj, ankaŭ de nuntempaj aŭtoroj, estas miriga, kaj laŭ tio kredebla estas la pretendo de Benczik, ke ... "poezio neniam estis en Hungario afero, kiu koncernas nur poetojn, kritikistojn kaj manplenon da legantoj. Poezio estis ĉiam la posedaĵo de la tuta nacio..." La tria tezo de la enkonduko, ke poezio estas esence parola arto, motivigis la decidon eldoni ĉi tiun du-diskan son-bukedon.

En ĝi vi trovos 47 poemojn, deklamatajn de 13 aktoroj, 6 viroj kaj 7 virinoj, el kiuj plej oftas Katalin Berek, sekvata de Zsigmond Fülöp, Kálmán Szabó, György Bánffy kaj Athina Papadimitriu. Du el la eroj estas kantitaj de Anna Kiss, kun gitara kaj piana akompanoj. Tri kvaronojn el la tradukoj oni ĉerpis de Kalocsay, dum seson pli kontribuis Péter András Rados. Vi renkontos 25 poetojn, kiuj estas kronologie prezentitaj, tiel ke la jarcentoj de la 15a ĝis la 20a, kun unu escepto, ricevas atenton proporcie al iliaj proksimecoj al la nuntempo.

Tri poemoj de Janus Pannonius reprezentas la 15an jarcenton, du de Bálint Balassi la 16an, dum la 17a estas preterlasita (Hungario estis tiam disigita sub tri regnoj). Mihály Csokonai Vitéz stafetas por la 18a jarcento, dum Vörösmarty, Petőfi kaj Arany pluportas (kaj plifajrigas) la torĉon tra la poezi-spronaj perturboj de la mezaj jaroj de la 19a jarcento. La dua disko de la albumo prezentas poetojn, kiuj verkis dum la nuna jarcento, el kiuj tamen nur du restas nun vivantaj.

La teksto de ĉiu poemo estas trovebla en la impona *Hungara antologio*, eldonita de Corvina Kiadó en 1983, kie la poetoj viciĝas ankaŭ en la kronologia ordo. La kvalito de la deklamado estas tia, ke aŭskultanto klare kaptas la vortojn sen la teksto, sed por elmediti la plenan signifon, havi ankaŭ la presitan tekston utilas.

La deklamado estas absolute laŭdinda, evidente multe ekzercita, sed impresas forte, flue kaj emocie. Foje oni rezignas pri la teksta elizio, foje iom modifas vort-finaĵon, nur unufoje misdiris (ekstrem iĝis eksterm!) — sed tiuj detaletoj estas neglekteblaj. Eĉ se vi ne estas poem-amanto, vi estos ravita de la ton- kaj son-kvalito trovebla ĉi tie.

Pluraj el la fruaj poemoj glorigas la patrolandon kaj la bataladon, kiu defendas ĝin: "Laŭdo de limoj", "Himno", "Proklamo". Tiun temon reprenas en posta epoko Petőfi; en "Penso min ĝenas" li laŭdas la martirecon por justa celo:

...spirege galopu al venk' akirita,
min tie lasante de hufoj ŝirita...

En "La poetoj de la deknaŭa jarcento" li, per sia relative simpla sed tre rekta kaj forta lingvouzo, taskas la poetojn, ke ili havas devon inspiri la popolon en la luktoj por memstareco, kaj draŝas tiujn artistojn, kiuj ne pretas socie engaĝiĝi:

...Se vi kapablas sole kanti
pri l'propraj ĝojo kaj dolor'
ja vin la mondo ne bezonas,
la sanktan lignon metu for!

Aparte impresaj estas la strofoj, deklamitaj de Ildikó Pécsi, el "Eŭropo mutas", kiam al Petőfi ŝajnas, ke aliaj revolucioj kaj liberigaj luktoj jam okazis aŭ neniam realiĝos, nun nur la hungaroj batalas:

...Jes, nin animu, ke ni estas
nun en la mond' la lasta meĉo,
brulantaj dum l'aliaj dormas
en nokto nigra kiel peĉo.

Aliflanke, iuj poemoj, precipe la postaj, priveas la vanecon kaj mizeron de milito, ekzemple "A

la recherche" de Miklós Radnóti. Simile, la morto mem iĝas kelkfoje la temo, ekzemple en "Kiel iu, falinta sur la rel'" de Dezső Kostolányi kaj "Morti" de Sándor Weöres. Ties "Saturno en descendo" en deklamo de Lajos Németh meritas apartan laŭdon, kiel ankaŭ "Ĉe Danubo" de Attila József, kie ni unue ĝuas naturpriskribon sed poste fluas laŭ pensofluso tra la juneco, deveno, radikoj kaj identeco-serĉo de la protagonisto, supozeble la aŭtoro mem. Paranteze notindas la antaŭnelonga eldono flanke de HEA de elektita poemlibro de la verkoj de Attila József *Urboranda nokto.*

Aperis malmultaj diskoj de poezio en Esperanto; pro la specifa gusto, kiun ĝi postulas, nur eldonistoj elstare kuraĝaj aŭ naivaj tion riskus. La nuna eldono estas aparte laŭdinda ĉar ĝin entreprenis ne misiisma sed malriĉiĝonta enmovada idealisto, sed la ĉefa komerca disk-eldona entrepreno de la lando, Hungaroton. La profesia eldonado certigis la kunlaboron de profesiaj aktoroj, la aliron al taŭgaj registrofaciligoj, kaj krome ke la disko ornamu plurajn montrofenestrojn tra Budapeŝto kaj ke ĝi enlistiĝu en la oficialaj katalogoj de diskoj.

La vigla historio de Hungario certigas abundon de variaj temoj en ĉi tiu ambicia bukedo. Ĝi estas por la Esperanta poezio mejlo-ŝtona sukceso — kaj la koncerna ŝtono estas ja la diamanto kiun aludis Örkeny — ĝi ne forvaporiĝis sed restas sensebla kaj kun plezuro aŭskultebla. Ĝojinde, ke oni uzas la internacian lingvon por diskonigi la parolan kulturon ĝuste de popolo profunde izolita per sia lingva unikeco.

Stefan MacGill

Hungara antologio

Corvina Kiadó

HUNGARA ANTOLOGIO. Redaktis Vilmos Bencsik. Eldonis: Corvina Kiadó, Budapest 1983. 448 p., 24 cm. Bindita. 241 verkoj de 73 hungaraj aŭtoroj ekde la 12a jarcento ĝis la nuntempo. Tradukita de 28 tradukistoj, la plej multaj pecoj de Kálmán Kalocsay. Ku kvinpaĝa redaktora enkonduko kaj rekomendo de William Auld.
Prezo: 57,- ned.gl. (Por Hungario: 300,- Ft)



Attila József:
URBORANDA NOKTO

URBORANDA NOKTO. Elektitaj poemoj de Attila József. Redaktis: Vilmos Benczik. Tradukis: Kálmán Kalocsay, Imre Szabó kaj aliaj. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1986. 141 p., 21 cm. Serio „Hungara Literaturo" n-ro 2.
La volumo enhavas ĉ. 70 gravajn poemojn de la plej konata kaj legata kreanto de la ĉijarcenta hungara poezio. La temaro de la poemoj estas tre vasta: amo, naturo, politiko kaj filozofio aperas en sinteza harmonio.
Prezo: 13,80 ned.gld. (Por Hungario: 55,- Ft)

Szilárd Bálint

La fermita koverto

La konstruadon de loĝkvartalo ĉiam karakterizas svarma kaj pulsa ritmo. Tio ofte ravis la junan viron Ákos, kiu laboranto kiel veldisto ĝuis la agrablan senton de la kreado. Kiam li havis iom da paŭzo nuntempe, li rigardis la ĉirkaŭe svarmantan laboradon, kaj revis pri la bela tago post du semajnoj, kiam li edziĝos al Adél. Kiel feliĉa li estos kun tiu plej aminda kaj plej bela knabino...

La laboristoj uzis gruon por la konstruado. La pigra maŝino kvazaŭ praa rinocero malrapide turniĝis kun la murelementoj pendigitaj sur ĝia kolo. Per nekredeble subtilaj movoj ĝi metas surloken la ŝarĝojn, rimarkis la observemaj okuloj de Ákos, kiu foje rigardis kiel oni alligas la panelojn surtere al la nazego de la gruo. Dume li ne ĉesis veldi kaj plezure rigardi la krakantajn fajrerojn kiuj preterkuras la ferbendojn, dum ili kunfandiĝas pro la terura varmego de li regata, por neniam plu delasi unu la alian.

La gruo malrapide proksimiĝis. Sur la teraso de la truso jam kuŝis la ferbetonaj traboj por la dua etaĝo. Kiel egaj krisignoj krutis aliaj traboj al la ĉielo. La pendanta betonmuro, kiel ŝvelinta velo flosis dignoplene en la aero. Ákos ĉesis momente labori, por atenti la movon de la murparto. Jen, abrupte ĝi haltis kaj malstabile stumblis. La ŝarĝo returniĝis. Denove ĝi impetis. Forte strečiĝis la ferfadeno, la panelo denove leviĝis. La manipulanto penadis en sia kajuto, li provis demeti la ŝarĝon en la alto. La ferfadenon de la gruo tiam kročis iu betontrabo, la kolizio ŝiris la ligaĵon, la trabo turniĝis, renversiĝis, ĝia angulo frapis la femuron de Ákos, por poste ekfalante kun granda bruo atingi la teron.

La homoj kuris al la akcidento, kie Ákos sangante kuŝis apud la betonmuro. Lia pantalono parte deŝiriĝis, fluis lia sango. La homoj senpove rigardis la sangadon de la junulo, dume iu kuris telefoni al la ambulanco. El la kontoro alkuris la arkitekto. Li surgenuiĝis apud Ákos, rapidmane forigis la sangan parton de la pantalono. Aperis antaŭ li la osto de la femuro. La inĝeniero teruriĝis: pro la sangelfluo tiu homo mortos, se ne venos savo... Pro abrupta ideo, la inĝeniero deprenis sian zonrimenon, kaj super la vundo preme ĉirkaŭligis la femuron. Donu rimenojn! — li kriis al la proksimuloj, kaj per la ricevitaj du rimenoj li tiel forte sukcesis ĉirkaŭligi la femuron, ke la sangado preskaŭ ĉesis.

La alveninta kuracisto prizorgis la vundon. Oni levis la brankardon kun Ákos en la blankan aŭton de la ambulanco, kiu rapide foriĝis.

En la hospitalo Ákos ankoraŭ duonnarkotite kuŝis sur la lito post la operacio. En lia cerbo miksiĝis konfuzaj songbildoj. Kvazaŭ kun Adél li promenas en densa arbaro, ili naĝus en lago, naĝante Adél sentas spasmon en la kruroj, li longe penas savi ŝin, fine li sukcesas... Poste ili senveste kuŝas sur la sabla bordo, ili avide interbrakumas, longe, longe, fine Adél diras: ni devas jam iĝi edzo kaj edzino...

Nur mallongaj vizitoj estis permesataj al la gepatroj de Ákos. La kuracisto konfesis, ke li ankoraŭ ne estas plene savita... ne maleblas, ke oni devos amputi la kruron... Adél en la koridoro atendante laŭte ploris.

Hejme ŝi priplendis la maltrankviligan situacion. Ŝia patrino provis doni konsilojn:

— Mi bone scias, kiel bona kaj diligenta viro estas Ákos. Altan salajron li ĝuis, bonega afero! Sed nun, kiam li iĝas kripla, unukrura, li ne plu laboros en la alto...

— Ankaŭ mi laboros, kaj, ĉar mi amas lin, mi volonte flegos lin, jes, fidele! — sonis la respondo de Adél.

— Pli malrapide, mia filinjo! Oni devas esti racia. Estas kaj troveblas sanaj kaj bravaj viroj, kiuj petos vian manon!

Adél senvorte eliris, kaj en sia ĉambro ŝi ĵetis sin sur la liton. Longe ŝi ploris. Kion respondi al la patrino?

La farto de Ákos nur malrapide iĝis pli bona. Restis ankoraŭ la problemo, ĉu oni devos amputi lian kruron? Adél daŭre vizitadis ŝin en la hospitalo, kie Ákos ofte laŭdis sian ĉefon, kiu nuntempe denove helpis lin, aliĝinte al la sangdonantaj kolegoj.

Foje dum vizito ĉeestis ankaŭ la arkitekto, kaj li akompanis hejmen Adél. La patrino kompreneble tre afable akceptis la arkitekton, kaj klopodis regali lin pli abunde, ol ĉe okaza vizito oni kutimas. Sed la familio tiam jam sciis de la patro de Ákos, ke li hezitas kunligi sian kriplecon kun Adél, juna, sana virino. Tamen, kun iom da eta espero, li atendas la decidon de sia fianĉino...

En la kapo de Adél kaose kirliĝis la pensoj kaj la sentimentoj. Dum kelka tempo ŝi ne vizitis la hospitalon. Ŝi atendis... Aliflanke komenciĝis renkontoj kun la arkitekto en agrablaj kafejoj. Li estis ĝentila, ankaŭ sindetenema, li devis vere plaĉi al Adél. Florbukedoj alvenis al ŝi, baldaŭ ankaŭ belaj hiacintoj blankaj. Novaj kaj novaj ĝentilaj gestoj celis la kreskantan simpation de Adél.

Dum la sekva vizito Ákos demandis rekte ŝin pri la eventuala decido. Ĉu? Ŝi eviteme

parolis, kaj petis paciencon. La kiso ŝajnis al Ákos nun malpli amema...

Kiam la arkitekto — ankaŭ pro instigoj de la patrino — proponis geedziĝon, Adél parolis denove eviteme. Mi elektos — ŝi forte emfazis —, sed mi ne informos vin tuj, kiel mi elektis inter vi, du viroj, kiuj ambaŭ estas jam karaj por mi. Vi ekscios miajn motivojn, la emon de mia koro, post unu momento. Mi priskribos tion kaj enfermos en koverton, kiun vi rajtos malfermi nur post unu monato!

Post tri semajnoj venis sciigo, ke la ĉefkirurgo sukcesis pri la komplika terapio, foriĝis la minacinta amputado, kaj Ákos versajne reakiros la irkapablon. Restis ankoraŭ unu semajno ĝis la malfermo de la koverto.

* * *

Kara Leganto! La Redakcio ne scias, kion enhavas la letero en la fermita koverto, tial ni petas vian helpon. La plej bona solvo ricevos libropremion, kaj la teksto aperos en Hungara Vivo. Limdato: du monatoj post la apero de la historio.

DAŬRIGO
de la novelo
La trajnoj tamen kuras plu
aperinta en la numero 1986/1
Daŭrigas:
Marthe Fabius
(Vierzon, Francio)

Miklós hejmenirante longe pensadis pri la stranga afero. Ĉu la alia lokomotivestro estas normala? Li havas ja grandan respondecon. Ĉu li konscias, kiom da vivoj dependas de li?

Post kelkaj tagoj Miklós renkontis la edzon de la virino.

— Kial vi estis tiel kruela kontraŭ via edzino? — demandis Miklós.

— Tio neniel koncernas vin! Estu feliĉa, ke pro mi vi ricevis la memormedalon pri vivosavo... Vi povas sciigi ŝin, ke eĉ post la eksedziĝo mi zorgos pri ŝi, sed mi nepre bezonas alitipan virinon! — diris la cinikulo, kaj montris dorson al Miklós.

En la hospitalo la vivemo de la junulino de tago al tago pliboniĝis. Miklós ofte vizitis lin, kiam li havis liberan tempon, kaj dum horoj interparolis kun ŝi. Al la junulino plaĉis la konduto de Miklós, kaj ŝi komencis kredi, ke la helpema promeso de la viro ne estis nur senbaza, ĝentila gesto.

La junulino rakontis, ke ŝi estas orfino. Ŝi finfine atingis bonan oficon kiel tajpistino, kaj esperis, ke la bona geedziĝo alportos feliĉan vivon. Bedaŭrinde ne tiel okazis. Tiam Miklós dusignife diris:

— Kiam mi promesis ĉian helpon por vi, petante nur vian konfidon, mi parolis sincere. Kaj se vi konsentas kun mi, tiam ni reciproke povos fari paŝon al la feliĉo...

— Pri kio vi pensas?

— Post geedziĝo la trajnoj tamen kuros plu al nia nuptovojaĝo. Pere de tiu trajno, kiun kondukos via edzo, tamen vi ne estos inter la reloj, sed en miaj fortaj brakoj!

Post kelkaj monatoj tiel finiĝis la historio.

Bertram Potts

Plaĉe tuŝas mian koron

Plaĉe tuŝas mian koron la sunkuŝiĝa horo,
kiam obroj fantomece ŝtele rampas,
kiam velkas sur ĉielo la fandiĝanta gloro,
kiu ĉion ĉie per orlumo stampas.

Plaĉe tuŝas min la burdo videble troŝarĝita,
kiu zumas ĉe la rozoj malgracie –
La rid-tintoj de la bebo am-fida kaj invita –
kaj alaŭdo, kiu fajfas rapsodie.

Plaĉas, kiam la cikadoj ekstreĉas sian klikon –
kaj trumpetas asfodeloj al la suno –
kiam kampoj aperigas buntbildan mozaikon –
kaj la silueto de tutvela skuno.

Plaĉe krakas la kameno dum vintra vento veas,
kaj la fora monto arbe tatuita –
la aŭtuna bruno, kiam folioj ekpereas –
la trankvilo de la kosmo infinita.

Plaĉe tuŝas fiŝboato kun kirlo de kriĉ-mevoj –
la odoro de jasmeno trafenestro –
plaĉas fari en fald-seĝo kastelojn el bel-revoj –
kaj muziko de la marĉo birdorkestro.

Plaĉas longe luksi vintre en varmo de bankuvo –
la kandela danco sur festena kuko –
la konvojoj da nub-ŝipoj ŝtorm-pezaj antaŭ pluvo –
la ronrono kata kaj kokina kluko.

Kiel plaĉas la rondiro, la sekvo de l' sezonoj –
la kontrastoj de la nokto kaj de l' tago;
plaĉas sano kaj feliĉo, plej gravaj vivo-bonoj,
la plezuroj de la sensoj – kaj imago!

D-ro József Mátéffy (1901–1986)

La 25-a de majo 1901 kaj la 4-a de novembro 1986 — jen la du limŝtonoj de eksterordinare riĉa homa vivo. La lasta adiaŭo de liaj cindroj okazis en la tombejo Rákoskereszturi la 21-an de novembro.

D-ro József Mátéffy dum la tuta vivo estis sindona adepto de la interpopola amikeco, paco kaj internaciismo. Li strebis per ĉiuj siaj fortoj estigi kontaktojn kun homa digno inter la filoj de la diversaj nacioj.

Por d-ro József Mátéffy Esperanto estis vivcelo kaj vivsenco. Li konatiĝis kun nia internacia lingvo en la jaro 1919 dum la regado de la Konsilantara Respubliko, kaj de tiam li aktive partoprenis la laboron de la Hungarlanda Esperanto-Societo: li gvidis kursojn, energie organizis la societan vivon. Inter 1921-1923 li estis protokolisto, de 1928 ĝis 1931 komitatano de HES. Kiel oficiala korespondanto de Heroldo de Esperanto inter 1924-1927 li aperigis en ĝi amason da ĝustaj, informivaj artikoloj pri Hungario kaj pri la hungara Esperanto-movado. Nepre estis pionira ago, ke de 1925 ĝis 1928 li aperigis Esperantan rubrikon en la hungara radiogazeto, kiu multe kontribuis al la popularigo de la lingvo kaj al la vastiĝo de la movado. En 1928 li akiris advokatan, en 1932 juĝistan diplomojn, kaj li havis postenojn kun granda respondeco; jen la datoj: 1929 tribunala notario, 1938 — tribunala juĝisto, 1946 — tribunala konsiliestro, 1948 — prezidanto de la Supera Tribunalo en urbo Debrecen, 1952 — membro, poste prezidanto de Konsilio de la Plej Supera Tribunalo de la Hungara Popolrespubliko. Tiun lastan postenon li havis tute ĝis la emeritiĝo. La fakaj artikoloj kaj la 6 juraj libroj, kiujn li verkis, eĉ nuntempe estas respektataj en juristaj rondoj.

Li estis homo tre okupata, sed se temis pri Esperanto, li neniam plendis pro tempomanko — por la movado li ĉiam havis tempon.

Post la liberiĝo li estis inter la unuaj, kiuj reorganizis la movadon. En la jaroj de la personkulto la esperantistoj devis silenti, kaj la glacio rompiĝis nur en la jaro 1955, kiam fondiĝis la Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro, kies vicprezidanto fariĝis li. Hungara Esperanto-Asocio naskiĝis en 1960, li estis ĝia komitatano kaj estrarano inter 1960-1977. De la jaro 1965 li estis elektita vicprezidanto, de 1967 ĝis 1977 li agis kiel prezidanto. Poste, tute ĝis la morto, li estis honora prezidanto de HEA. Li plenumis krom la nenombreble multaj movadaj ĉiutagaĵoj ankaŭ tiel gravajn farendaĵojn kiel la ellaboro de la statuto de HEA. Lia vivo estis multfaceta: li okupiĝis seninterrompe pri instruado preskaŭ ĝis la lastaj spiroj, li instruis, ekzamenis. Lia konversacia libreto, verkita kune kun d-ro István Nagy, estas eĉ nuntempe populara. La gramatika parto ankaŭ nuntempe estas vaste uzata, ĉar la instruistoj multe ŝatas ĝin pro ĝia klareco. Li paralele kun ĉio ĉi regule aperigis artikolojn en diversaj gazetoj, ĉefe en nia Hungara Vivo, kies respondeca redaktoro estis ĝuste li dum jardeko inter la jaroj 1967-1976.

La hungara esperantistaro gardos la memoron pri li.

József Mátéffy malfermas la Hungaran Kultur-Festivalon en la jaro 1972 (Foto de Z. Fejér)

Poemoj de Julio Varga

La 13an de aprilo 1986 forpasis Julio Varga, kies poemojn ofte povis renkonti niaj legantoj sur la paĝoj de HV. Julio Varga naskiĝis en 1905, kaj ellernis Esperanton en 1963, jam havante 58 jarojn. Li kontribuis kiel tradukisto al *Hungara Antologio*, aperinta en 1983.

Ni omaĝas al lia memoro per publikigo de kelkaj poemoj el liaj postlasaĵoj.

Solvo

Prilumis vi la temon brile, malavare.
Estingu „lampon", ĉar ni ŝatus vidi klare.

Viruso

Vi nevidebla kaj potenca, stulta!
Ni scias: venkos vi finfine,
kaj nin enpuŝos en la tombon.
Sed tiel ankaŭ vian tombon vi preparos,
ja sen vivanta ĉel' vi malsatmortos.
Ĉar Leĝ' ekzistas: kiu pereigas
aliajn – tiu iĝos nulo,
kaj kiu oferdonas vivon sian
por aliuloj – tiu vivos!

La vorto

Pikil' ne estu vorto, kaj ne vanta. –
Balzamo, resaniĝon donacanta!

Ne kojno, kiu ĉiam nur forigas. –
Agrafo, kiu korojn bukas, ligas!

Ne estu ĝi malhoma aŭ detrua. –
Humana, varma, helpa kaj konstrua!

De l' bono, ver' deviu ĝi neniam,
atingu ĝis la suferanto ĉiam.

Konsole ĝi aspergu sur homfraton,
de l' far' ricevu ĝi aŭtoritaton.

Sur padoj ĝi pac-anoncante iru,
al voĉ' de nia panjo ĝi similu.

Ĝi estu milda, mola kaj brakuma,
samkiel serenad' en nokt' lunluma.

Mi ŝatus iĝi

por la falanta: spong' elasta, mola,
por pesimisto: flago verda, ora,
balzam', bandaĝ': por la vundito,
futur': por la konservativo,
por la amare lamentant': mielo,
por la larmant': tuket' viŝanta,
por la ĝojanto: Iu, kiu
dividas la feliĉon jam kun tiu,
por la senhejma: varma ĉambro eta,
por malsatanto: blanka pano preta,
kunul': al rigardanto la Ĉielon,
direkta pad': por prodiganto, celon
montranta al la hejma vojo,
por ĉefo, potencul': humilo,
por la forfet' de masko: ilo,
por subpremato: fort', aplomba volo,
levanta lin eĉ el profundo, polvo,
por hezitanto: firma, certa roko,
garantiaĵo ora: al la vorto,
apogbastono: por la olda homo,
finfine por mortant' konsol', espero:
„la fin' – komenco", tiu ĉi la vero.

Miniaturoj

La najlo

Ĝin premas pli profunden ĉiu bato,
la febla deklinigas sub la fato.

En dom' vantadas lustro, bild' parade;
ĝi tenas alkroĉitan ŝarĝon ade. –

Ĉu la batanto estas la pli granda,
aŭ najlo, servon kun humil' faranta? ...

Geneologio

Stulta parol': ke la homo devenis de ia simio;
plie de l' murda leon', vulpo aŭ kameleon'.

Mano manon lavas

Belas, se helpas la homo al hom', sed kelkfoje la akvo
estas malpura, kaj – ve – restas glueca la man'.

Distanco

Jam atingebla estas eĉ la Jupitero.
Ĉu hom' al hom' alvenos iam sur la tero?

Artistino Nelli Németh

Nian frontpaĝon ornamas verko de Nelli Németh, atentinda figuro de la juna generacio de la nuntempa hungara pentroarto. Ŝi naskiĝis en la jaro 1950, kaj diplomiĝis en la Budapeŝta Altlernejo pri Aplikata Arto en 1974.

Ĝis nun ŝi havis kvin memstarajn ekspoziciojn: en Budapeŝto (1978), Nagykanizsa (sia naskurbo, 1979), Kecskemét (1981), Hamburg (FRG, Galerio Mensch, 1982) kaj denove en Budapeŝto (1985), krome ŝiaj verkoj estis videblaj en multaj en- kaj eksterlandaj kolektivaj ekspozicioj.

Ŝiajn verkojn karakterizas fajna fabela ŝvebado, ŝi volas eternigi ĉiun momentan etoson, ekviglantan senton, esprimi profunde nestantan sopiron por feliĉo, por vera plenumiĝo.

En ĉiuj siaj verkoj antaŭ ĉio ŝi mem ĉeestas: la Virino, kiu rigardas la mondon per aliaj okuloj, kaj kies mondrigardo rezultigas mond-bildon mole anim-tuŝan, tamen samtempe profunde intelektan.

(*V. B.*)

Vizitoj de Ĵorĵet-princo

Artistino Nelli Németh (Foto de Z. Fejér)



PANORAMO

La nederlanda reĝino en Budapeŝto

Komence de oktobro laŭ la invito Pál Losonczi, prezidanto de la Prezidio de la Hungara Popolrespubliko, vizitis Budapeŝton Beatrica, la reĝino de Nederlando.

Lige kun ŝia vizito en Hungario estis aranĝitaj pluraj ekspozicioj pri Nederlando, interalie pri la nuntempa nederlanda pentroarto.

Sur nia foto: reĝino Beatrica diras toston en bankedo okazigita je ŝia honoro.

Leĝo pri familia juro

La ĉefa tagordo de la aŭtuna sesio de la hungara Parlamento estis la pritrakto de nova leĝo pri familia juro. La nova leĝo interalie malfaciligas divorcojn, kies lastatempa multiĝo elvokas seriozajn sociajn problemojn en Hungario. Pluraj deputitoj ne konsentis pri kelkaj punktoj de la leĝprojekto, kiun fine la Parlamento akceptis nur kun modifoj – kaj ne unuanime.

Sur nia foto: Imre Markója, ministro pri justico, prezentas la leĝprojekton al la Parlamento.

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

PANORAMO

Vizito el najbara lando

Fine de oktobro gastis en Budapeŝto Gustav Husak, ĝenerala sekretario de la CK de la Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio. Inter Ĉeĥoslovakio kaj Hungario estas tre ampleksaj kontaktoj sur ĉiuj kampoj de la vivo: pri ties plua vastigo traktis la najbarlanda ŝtatestro kun sia gastiganto, János Kádár. Dum la vizito estis subskribita la perspektiva plano pri la ekonomia kaj sciencteknika kunlaboro inter la du landoj ĝis la jaro 2000.

Sur nia foto: János Kádár adiaŭas en la flughaveno sian gaston.

Nostalgio en Szentendre

Szentendre, ĉarma urbeto situas norde de Budapeŝto, kaj ĝi estas ofta celo de en- kaj eksterlandaj turistoj. Dum la pasinta somero la turistojn multe plezurigis la omnibuso, tirita de ĉevaloj, kiun „funkciigas" la Societo Nostalgio.

Lastatempe oni revivigis kun turisma celo ankaŭ aliajn malnovajn veturilojn: tio vekas nostalgiajn sentojn en maljunuloj, kaj faras pli „palpebla" la pasintecon por junuloj.

Sur nia foto: la nostalgia omnibuso de Szentendre. (Foto de Z. Fejér)

PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO + PANORAMO

Jam en 17 grandurboj de 10 landoj

Vieno, Salzburg, Prago, Dresdeno, Berlino, Basel, Malmö,
Varsovio, Krakovo, Bukareŝto, Mangalia, Varno, Burgas,
Sofio, Ateno, Split, Romo

Vi povas alveni ripozinta,

UTASELLÁTÓ

se Vi veturas per la dorm- kuŝ- kaj manĝvagonoj de

Kie ajn Vi estas en la lando...

UTASELLÁTÓ

estas Via vojaĝpartnero!

Vizitu niajn restoraciojn, gastetojn, bufedojn.
Ni certigas manĝon por grupoj,
surprenas la organizadon de aranĝoj.
Ni alvokas Vian atenton
pri niaj duaklasaj restoracioj

ĈIE KAJ ĈIAM

UTASELLÁTÓ

REVUO DE REVUOJ

Estas la metodo, eĉ tasko de klinikoj profunde ekzameni por rezulte rekomendi terapion. Se jam LA KANCERKLINIKO (38.) ekagis tiel metante la E-gazetaron sur sian laboratorian tablon, eĉ la partaj rezultoj meritas atenton. Scivole mi legis la rimarkindajn rimarkojn, kvankam mi ne vidas nian gazetaron tiom malsana, kiom la verkinto de la artikolo. Ĉu ĝin — singulare? Kune niajn gazetojn kapti, komplekse, apenaŭ konvenas. Bonvenas nepre liaj avertoj kaj rekomendoj, sed indas ankaŭ distingi! Akra kritiko tute ne maltaŭgas, ec! La konstatojn oni — redaktoroj kaj eldonantoj — bonvolu ne ŝultron levante preteriri!

Mia modesta opinio estas, ke anstataŭ konsideri nur komplekse, prefere oni „distranĉu" nian gazetaron je du, eble tri apartaj kategorioj. *Bultenoj*, servantaj kiel informiloj kaj ligiloj inter la membroj, bezonas tute aliajn trajtojn, kaj aspekte, kaj enhave, ol la *revuoj*. Multe malpli la bultenoj estas legaĵoj, prefere ili estas direktindaj al la loke konvenaj celoj. Kial ili devus konkurenci kun iaj naciaj, eventuale pli altnivelaj bultenoj de diverslandaj societoj? Per si mem ili ja devas altiri la intereson de la asociaj membroj; malmultekosta aspekto efektive ne gravas. Estas la revuoj — komence de ESPERANTO kaj HEROLDO, tra la literaturaj revuoj ĝis la „koloraj" ĉina kaj hungara, se diri modeste — kiuj devas prezenti al nia vasta publiko la legaĵojn, la pli altan „kulturon" el nia movado.

Jam malnova problemo de disdialektiĝo revenas en tiu ĉi artikolo, ankaŭ iom simile en artikolo pri „Seksismo" en LA BRITA ESPERANTISTO (871.) koncerne la „sufiĉecon" de nia vortaro. Prave, ĉar ekzistanta danĝero minacas nun el vortara vidpunkto. Jes, precipe pro okcident-devenaj vortoj enŝtelitaj sub la falsa preteksto de ilia internacieco (komprenu: modaj en nacilingvaj gazetaroj). Nia diligenta kolegaro ofte emas forgesi, ke Eo, *laŭ sia esenco*, kiel facila interkomprenilo, nepre devas rezigni pri la historie devenintaj — kaj laŭnacie en diversaj terenoj elkreskintaj — abundo de sinonimoj.

Kaj tute same Eo forigas — feliĉe! — la neglekteblajn gramatikajn diversaĵojn de multaj lingvoj. La ne-ekzisto de genra deklinacio ofte sugestas „mankon" al nacianoj, kies lingvo entenas tian seksismon. La vivanteco de Eo, kiu certagrade necese tamen sekvas la parolkutimojn de la homaro, konsideratas „mallogikeco"; kvankam en lia geaptra lingvo troveblas maro da mallogikaĵoj... La bone komprenebla puŝo de la gepatra lingvo erarigas, ekzemple pri la komunseksa senco de „instruisto", konsiderante ĝin dubasenca; ĉu tion „korekti" oni eble revenu al *der-die-das*? Ne eblas konsenti kun la deziro, ke Eo posedu pli „modernan" seksan esprimaron ol la naciaj lingvoj; se tian „modernigon" oni postulos en la gepatra lingvo, la naiveco tuj klare manifestiĝos. Kompreneble, parolantoj de ĉiu ajn lingvo povus elpaŝi por siaj lingvaj bezonoj, postulante kompletigon de Eo... Estus terure, se oni ne kontraŭstarus tiaspecajn emojn kiuj intencas klini E-on al certaj lingvoj.

Niaj veraj revuoj prezentas ne malmulte da atentindaj artikoloj, kaj pri surprize multaj sferoj. Kvankam abundas legantoj, kiuj malpreferas revuojn kun centra temo, KONTAKTO (4.) kurioze prenis maljunulan temon: la *morton*. Sekve ni estas provizataj per interesaj novaĵoj, inter kiuj eminentas la prahistoriaj manieroj de la enterigoj, studo de la senlaca B. *Golden*. Apud ĝi volonte mi legis la ĉarman-naivan malkovron de iu junmonaĥo, laŭ kiu la peko de Adamo estas la nuna kialo de la morto...

Verŝajne pro hazardo ankaŭ antikva temo, tiu pri la misteraj Etruskoj vekas atenton en LITERATURA FOIRO (95.). Gianluigi *Gimelli* konigas tiun — por multaj nekonatan — malkovron, kiu devus alproksimigi la mondon al la solvo de tiu mistero. Pri la grandioza Victor *Hugo* estus malfacile verki pli sprite koncizan kaj multedonan portreton, ol tion faris G. *Lagrange*.

Komenciĝis altinteresa artikolserio en MONATO (7.) trarigardanta skize la historion de la judaro en Pollando, por prilumi la kontribuadon de la judoj al la pola kulturo nuntempa. La senkaŝa historia artikolo prezentas nekonatajn faktojn kaj rimarkindajn interrilatojn en la socio. Nepras legi kaj indas koni! — Nelaste: ni gratulu ESPERANTISTOn SLOVAKAn okaze de ĝia 40 jara jubileo — ĝi estas belaspekta, varienhava kaj plaĉega bulteno.

Ervin *Fenyvesi*

MALANTAŬ **SKÁLA**

La 69 SKÁLA-COOP magazenoj de la konsumkooperativoj ĉie en la lando atendas la afablajn klientojn kun speciale riĉa varsortimento, kaj kun unika varskalo de nutraĵoj, vestaĵoj kaj aliaj industriaj produktaĵoj.

LIBROVENDADO – 1985

Diversaj spertoj atestas pri tio, ke la plej multaj esperantistoj, eĉ libroamantoj, scias tre malmulte pri la kvantaj aspektoj de la Esperanta libromerkato. Iuj diros pri tio la kutiman klišon „gravas kvalito, ne kvanto" – kaj ili plene malpravas, ĉar kvalito povas elkreski nur el kvanto. Estas tre grave, ke la libroj atingu en kiel eble plej granda kvanto la publikon. Jen, nur kelkaj vidpunktoj: 1. Estas tute ne indiferente, kiom da homoj estas portantoj, konsumantoj de la Esperanta kulturo, kiun peras la libroj. 2. Adekvata eldonkvanto povas certigi malpli altan prezon, kaj ankaŭ aperigon de pluaj verkoj. 3. Pli granda eldonkvanto ebligas pagi (pli bone pagi) la aŭtorojn, kaj tio altiros pli da talentaj homoj.

Ĝis nun se aperis vendostatistikoj, ili ĉiam indikis nur tion, kiuj libroj plej bone vendiĝis, sen publikigi absolutajn ciferojn – tiuj restis en sekreto. Nun HEA decidis prezenti al la publiko sian vendostatistikon de la jaro 1985, kaj post kelkaj monatoj aperos ankaŭ tiu de la nuna jaro.

La jena statistiko enhavas ĉiujn proprajn eldonaĵojn de HEA, kiuj vendiĝis dum la jaro 1985 en pli ol 20 ekzempleroj. Ĝi ne enhavas la librojn de SEC kaj la eldonaĵojn de la Komputista Grupo de HEA, manke de fidindaj ciferoj. Post la titolo staras parenteze la eldonjaro, kaj ĉe libroj aperintaj en 1985, ankaŭ la monato de la enmerkatiĝo. Kompreneble tiu statistiko enhavas ĉiujn vendojn, do ankaŭ tiujn al aliaj libroservoj. Proksimume 20-30 procentoj de ĉiuj venditaj libroj iris al hungaraj esperantistoj, la ceteraj 70-80 procentoj estis senditaj al eksterlando.

La suban liston oni ne rigardu ia komerca raporto: ĝi donas studindan momentfoton pri la gusto de parto (ĉefe orient-Eŭropa) de la esperantista legantaro.

1.	Princz, O.: Eszperantó nyelvkönyv (1984)	4351
2.	Seppik, H.: La tuta Esperanto (1984)	2140
3.	Nemere, I.: Febro (Orig. romano, 1984)	1569
4.	Prus, B.: La Faraono (Bildrakonto, 1980)	1359
5.	Lienhardt, A.: Amuza legolibro en Eo (1984)	1130
6.	Lorjak: Eŭlalia (Orig. romano, 1984)	1080
7.	Nemere, I.: La Monto (Orig. romano, 1984)	1059
8.	Modest, J.: La ora Pozidono (Orig. romaneto, 1984)	989
9.	Móricz, Zs.: Varmega kamparo (Tr. romano, 1985. januaro)	768
10.	Kalocsay, K.: Dek prelegoj (Eseoj, 1985. oktobro)	748
11.	Pechan, A.: Gvidlibro por supera ekzameno (1979)	747
12.	Gárdonyi, G.: La steloj de Eger (Bildrakonto, 1980)	701
13.	Aszlányi, K.: Sep vangofrapoj (Tr. romano, 1984)	700
14.	Petőfi, S.: Johano, la brava (Tr. poemfabelo, 1984)	634
15.	Mikulás, J.: Taskfolioj por komencantoj (1983)	522
16.	Baghy, J.: La verda koro (Romaneto por komencantoj, 1982)	466
17.	Tabi, L.: La Damo de l' Fatalo (Tr. teatraĵo, 1985 marto)	365
18.	Benedek, E.: Hungaraj fabeloj (1979)	232
19.	Twain, M.: La aventuroj de Huckleberry Finn (Bildrakonto, 1982)	212
20.	Elem, J.: Betonterapio (Tr. teatraĵo, 1985 marto)	187
21.	Nemere, I.: Sur kampo granita (Orig. romano, 1983)	183
22.	Twain, M.: La aventuroj de Tom Sawyer (Bildrakonto, 1981)	181
23.	Nemere, I.: La blinda birdo (Orig. romano, 1983)	176
24 – 25.	Szilágyi, F.: La vivo de Sándor Kőrösi Csoma (Tr. biografio, 1984)	173
	Gajdar, A.: Timur kaj lia taĉmento (Tr. romano, 1982)	173
26.	Dilemoj de la nuntempo – vide el Hungario (Tr. studoj, 1984)	166
27.	Lienhardt, A.: Amuzaj dialogoj en Eo (1980)	161
28.	Golden, B.: Marĝene de la lernolibro (Prilingvaj artikoloj, 1982)	108
29.	Móricz, Zs.: Malriĉaj homoj (Tr. rakonto, 1979)	102
30.	Lorjak: Iluzioj (Orig. noveloj, 1982)	95
31.	Hungara Antologio (1983)	94
32.	Hundbazaro (Tr. poemoj, 1979)	86
33.	Barcsay, Zs. (red.): Metodiko en la praktiko (1982)	73
34.	E-a – Kamboĝa Vortaro (1976)	68
35.	Krúdy, Gy.: La rozo de l' sultano (Tr. fabelo, 1982)	65
36.	Heltai, J.: La Morto kaj la kuracisto (Tr. novelo, 1981)	65
37.	Móricz, Zs.: Ĉiela birdo (Tr. rakonto, 1980)	58
38.	Kalocsay, K.: Tutmonda Sonoro I-II. (Tr. poemoj, 1981)	46
39.	Baghy, J.: Gramatika demandaro resuma (1982)	40
40.	Kemalov, N.: Naŭ jaroj en la infero (Tr. prozo, 1980)	35
41.	Nemere, I.: La naŭa kanalo (Orig. rakonto, 1985 decembro)	34
42.	Molnár, F.: La knaboj de Paŭlo-strato (Tr. romano, 1978)	29
43.	Hules, A.: Katoj kaj ĉevaloj (Orig. poemaro, 1982)	25
44.	Tárkony, L.: De paĝo al paĝo (Eseoj, 1977)	24

Premio por Zoltán Fejér

Ĉi-jare la unuan fojon oni aranĝis en Hungario la fotokonkurson „Hungara Fotografaĵo 1986". Laŭ la intenco de la aranĝantoj – la dek plej gravaj entreprenoj kaj instancoj, kies agado ligiĝas al la fotado – simila konkurso okazos en ĉiu dua jaro, kaj ĝi celos doni plenan superrigardon pri la laboro de la hungaraj fotistoj.

Al la ĉijara konkurso alvenis ĉ. kvarmil fotoj. Zoltán Fejér, fotisto de nia revuo gajnis duan premion per du siaj fotoj en la kategorio de profesiaj fotistoj.

Unu el tiuj fotoj estis farita pri la ankaŭ eksterlande bone konata hungara pentroartisto Endre Bálint (intertempe mortinta), kaj origine ĝi devus aperi kun la artikolo pri li en la n-ro 1985/1 de nia revuo.

La dua premiita foto prezentas la pentriston András Orvos, pri kiu ni aperigos artikolon en iu nia venontjara numero, kaj tiam kompreneble presiĝos ankaŭ la premiita foto pri li mem.

Nia redakcio varme gratulas Zoltán Fejér pro la signifa sukceso!



Zoltán Fejér: Okulvitroj. (Portreto de Endre Bálint.) Foto gajninta duan premion en la fotokonkurso „Hungara Fotografaĵo 1986"

Lajos Nagy (1883–1954)

LA TERO

Kiam la milito eksplodis, Mihály Bakó loĝis ankoraŭ hejme, en sia vilaĝo. Taglaboristo li estis, kiel dum sia tuta vivo. Li havis edzinon kaj tri infanojn, malgrandajn; la tria estis ankoraŭ suĉinfano. En la domo de la grandbienulo János Deák ili luis unu el la ĉambroj. Ili povis uzi ankaŭ la kuirejon kaj la kvaron-arpentan ĝardenon. La bienulo loĝis en la farmo, la alian ĉambron li ŝlosis.

La ĝardeno ne multe utilis al la edzino de Bakó, ĉar senĉese ŝi estis okupata pri siaj infanoj. Beletvizaĝa, dika kaj vila virino ŝi estis, la najbarinoj diris, ke malpura ŝi estas. Ŝi ne zorgis pri la ordo de la ĉambro, kuirejo, korto, ankaŭ tion oni diris, ke pigra ŝi estas. Al la infanoj kelkfoje ŝi donis nur marmelade ŝmiritan panon, pro tio oni opiniis, ke malserioza ŝi estas, se ŝi havas kelkajn groŝojn, ilin ŝi malŝparas, tiatempe ili manĝegadas, poste venas la fastaj tagoj. Pri Bakó mem la najbaroj diris, ke li estas granda komunisto. Ĉar ĉiam li diris malmulta la salajron.

Ĉirkaŭ la mezo de la milito Bakó jam laboris en la ĉefurbo. Karbon li portadis en la stacidomo Jozefurbo. Ĉiun duan dimanĉon li vojaĝis hejmen al sia familio. Poste komenciĝis la fortaj bombardadoj. Hejme oni demandis lin, ĉu li ne timas en Budapeŝto, tie en la stacidomo, en la plej danĝera loko. Silentema homo li estis, eĉ sian ŝultron li ne movis, nur foje li respondis, jene:

— Egale estas por malriĉulo, kie li estas, li ja ne povas kaŝi sin.

Lia edzino kelkfoje volis lin persvadi, ke li restu hejme, li trovos laboron ankaŭ en la vilaĝo, ankaŭ tiel ili povos vivi:

— Ja kion mi faros kun tiuj ĉi orfoj, se vi pereos? — ploretis la virino.

Bakó ne respondis, nur rigardis en la aeron. Eble li hezitis. Sed lunde en frua tagiĝo li ellitiĝis, kisis la edzinon, la infanojn, kaj reveturis en la ĉefurbon. Ili bezonis monon por vivi, kaj krom tio ili volis konstruigi dometon, por ne resti por ĉiam luantoj.

Iun dimanĉan antaŭtagmezon la bienulo per veturilo envenis el la farmo. Bakó estis hejme, do la bienulo trovis lin. La luiganto demandis lin:

— Kion oni diras en Budapeŝto, kiu venkos en la milito?

Bakó respondis:

— Kiu ajn venkos, mi kaj mia familio ne povos havi pli malbonan sorton.

— Nu-nu — ektimis la bienulo, poste pri alia temo li komencis paroli. Kiam estos jam preta la domo, ĉar li reloĝiĝos en la vilaĝon, kaj lia edzino kaj filino ne volas tiel grandan familion ĉirkaŭ si.

Tiel li diris, milde, la bienulo, sed kiam li ĉirkaŭrigardis inter la infanoj de la geedzoj Bakó, en penso tiel li modifis siajn vortojn: ili ne volas en la domo tian almozulan popolaĉon.

Bakó baldaŭ obeis al la petego de sia edzino, kaj restis hejme. De tiam ili vivis eĉ pli malabunde, ĉar la mastroj pagis tro malmulton. Ili diris, ke pli ili ne povas pagi, ĉar tion ne eltenas la prezoj, malalta estas la prezo de la produktaĵoj. Kaj ne ĉiutage li trovis laboron. Oni parolis pri la Bakó-familio en la vilaĝo. Ke la infanoj ne devus esti tiel malpuraj, kaj vagadi en tiaj ĉifonoj. Tio estis la opinio, ke Bakó ne serĉas diligente laboron. Kial li forlasis sian bonan postenon en la ĉefurbo, kial li timas pri la mizera vivo? La edzino de Császár legis en la gazeto, en iu tre saĝa artikolo, ke la kamparanoj ne povas ekonomie manipuladi per la materialo, ili ne komprenas la kuriarton. Pro tio estas tiel aĉa la manĝaĵo de la Bakó-familio. István Császár, la okdek-arpenta mastro, eldiris, ke li envias tiajn homojn, kia estas Mihály Bakó. Ĉar li manĝas, kiel la aliaj, poste li havas nenian zorgon, ne li pagas la grandan imposton.

Ĉirkaŭ la fino de la milito oni forportis Bakó-n por soldatservi. Ĉar je unu kruro li lametis, nur por laborservo. Li devis anonci sin en Budapeŝto, sed de tie oni baldaŭ forportis lin trans Danubon. Tiam jam la rusa Ruĝa Armeo atingis la riveron Tisza. En la tempo de la ekiro Bakó ankoraŭ povis sendi sciigon per iu samvilaĝano, sed leteron li jam ne povis skribi, li fortiriĝis de sia familio. Ĝuste tiam finkonstruiĝis ilia domo. El la ĉefurbaj salajroj Bakó ŝparis iom da mono, ankaŭ pro tio ili ofte malsatis, li petis ankaŭ prunton por la konstruado. la garantianto estis lia bofrato, tiel povis konstruiĝi la domo. Ĝi kostis kvarmil okcent pengojn, kaj staris sur la suda rando de la vilaĝo, sur monteto, preskaŭ ekster la vilaĝo, kiel soleca gardobudo. La virino kun la infanoj enloĝiĝis.

Bakó estis ĉiam pli malproksimen komandita. Senĉesa marŝado, enloĝiĝo, kaj denove ekiro estis lia servo. Malsatante, malvarmumante, en malakra laciĝo li lamadis, nenion li komprenis el tio, kio okazis kun li. Nur tion li konjektis malklare, ke la afero de la sinjoroj ne staras tre bone. Tion bedaŭri neniel li povis, eĉ ne volis. Liaj kamaradoj kelkfoje mallaŭte paroladis. Je iliaj vortoj oni ne povis orientiĝi. Ĉar iu el ili estis malgaja, kaj aliaj estis fidemaj, sed oni ne povis scii, pri kio. La oficiroj de tempo al tempo donis lecionon por li, ke baldaŭ ili haltos, kaj poste returniĝos. Ili diris, ke ni elpelos la rusojn el la lando, kaj puniĝos tiuj, kiuj restis hejme. Iu lia kamarado apud li murmuris:

— Se ili povos elpeli, kial entute ili enlasis la rusojn?

El Bakó ŝprucis la konsento:

— Jes!

Nur de siaj kamaradoj aŭdis Bakó, ankaŭ tion nur flustre dirite, ke Budapeŝto jam delonge kapitulacis. Li aŭdis ankaŭ pri ia registaro kaj pri preparîganta terdivido. Pri tio parolis liaj soldatkamaradoj, eĉ ankaŭ la oficiroj, tiel instruante ilin, ke hejme oni volas forrabi la teron de ĝiaj rajthavaj posedantoj.

La rusoj jam marŝis proksime al Germanio. La trupon de Bakó oni ĉiam pli malproksimen portis al okcidento. Ankaŭ pri tio aŭdis ion Bakó, ke en lian vilaĝon, situantan apud Danubo, jam delonge enmarŝis la Ruĝa Armeo. Sed pri tio li ne sciiĝis, ke estis batalo en la ĉirkaŭaĵo de la vilaĝo. Kelkaj kanonpafoj trafis ankaŭ la vilaĝon. Unu pafaĵo trafis ĝuste lian domon. La infanoj tiutempe vagadis for de la domo, sed la edzino kuiris interne, kaj ŝin murdis la eksplodo. Pri la infanoj zorgis la frato de Bakó, same taglaboristo, samtiel malriĉulo, kiel mem Mihály Bakó. La edzinon oni entombigis, kaj la pli sentemaj najbaroj, kiel la virinoj, ploris pro ŝi. Oni parolis poste pri la kompatindaj orfoj kaj pri la malfeliĉa virino. Ĉu ili bezonis la domon? Ili estus povintaj prokrasti la enloĝiĝon ĝis la printempo, ĝis tiam eble finiĝos tiu terura milito. Sed tiu satana János Deák pelis ilin.

La vilaĝanoj nenion sciis pri Mihály Bakó, ankaŭ li ne ricevis sciigon el sia hejmo. Pri la morto de la edzino li informiĝis nur tiam, kiam monatojn post la fino de la milito li estis survoje hejmen. Ĉe iu stacidomo, situanta ne malproksime de lia vilaĝo, li devis ŝanĝi la trajnon. Tie li renkontiĝis kun Ferenc Csernyák.

— Ĉu estas vi, Miĉjo? — tiel paŝis antaŭ lin Csernyák. — Apenaŭ mi rekonas vin, tiel vi maldikiĝis.

Ili manpremis. Csernyák sen hezitado, rekte kaptis la temon:

— Ĉu vi scias, ke via edzino mortis?

Bakó nur rigardis al Csernyák per siaj grizaj okuloj. Nenion li demandis. Csernyák diris de si mem plu. Ke kanonpafo trafis la domon. La virino ne suferis, tuj ŝi mortis. Kiam Csernyák eksilentis, Bakó ankoraŭ gapis antaŭ sin, poste li demandis:

— Ĉu la infanoj?

Csernyák respondis:

— La infanoj estas ĉe via frato.

Poste ili kune surtrajniĝis, ankaŭ Csernyák veturis hejmen.

Vid-al-vide ili sidis sur la benkoj, pri tiuj ĉi aferoj ne estis pli da vortoj. Csernyák parolis pri tio, kio okazis en la vilaĝo. Ankaŭ tion li rakontis, ke oni disdonis la teron, sed Mihály Bakó ricevis neniom, ĉar li ne estis hejme. La vagonaro klakadis, Bakó silentis, li rigardis tra la fenestro la agrojn, scivolante, kiel ili estas prilaboritaj. El polvoza, nigra tabako li rulis cigaredon kaj bruligis ĝin. Nenion li demandis. Li ne estis hejme! Iom li meditis pri tio. Li ne povis imagi, ke li estus ricevinta iom, eĉ se li estus estinta hejme. Kvazaŭ estus alia homraso tiu, kiu posedas teron. Posedas tion István Császár, János Deák, sed Bakó posedis neniam.

— Via frato ricevis ok arpentojn — ekvoĉis ankoraŭfoje Csernyák, ĉar tion diri ĝis nun li forgesis.

— Ĉu ok?

— Tiom.

Nur longe poste ekridetis iom Bakó.

— Mi iros al li taglabori.

Lia domo ruiniĝis, do li iris al sia frato. Por vespermanĝi, kaj dormi. Li kisis siajn infanojn. Donacon li ne alportis. Ankaŭ anstataŭ tio li karesis la kapon de la infanoj. Malsate, sen unu groŝo li alvenis. La vespermanĝo estis terpomoj kuiritaj en sia ŝelo.

La sekvan tagon frumatene li eliris serĉi laboron, sensukcese. Tio okazis plurfoje. Poste li sidadis hejme. Unu el siaj infanoj li sidigis sur sian genuon kaj rajdigis lin. La kolon de la plej malgranda li tiklis, por ke li ridu iom.

Tagmeze Pál Czomboly venis al li:

— Donu Dio bonan tagon, Miĉjo! — li salutis. Kaj li eksidis. Pipon li elpoŝigis. — Kie vi estis tiel longe? — Ni jam kredis, ke vi ne plu revenos hejmen. Tiel do vi ne ricevis teron, ĉu?

Bakó kapjesis. Ke vere tiel estas.

— Nu, aŭskultu! — komencis post mallonga paŭzo Czomboly. — Ekzistas ĉie terdividaj komisionoj. Ankaŭ ĉe ni ekzistas, en nia vilaĝo. Kvarope ni estas en ĝi, ankaŭ mi estas ĝia membro. Mi vizitis vin por alporti la informon, ke vi ricevos teron. Vi ne pretendis, neniu anoncis vian nomon, eĉ tion oni parolis, ke vi pereis en la milito. Sed tamen vi revenis hejmen, kaj antaŭ du semajnoj mortis András Jász, post kiu restis neniu, tiel liaj dek arpentoj liberiĝis. Vi povos ricevi ilin.

Ĝis tiam Mihály Bakó rigardis la teron, kaj ankaŭ nun li ne levis la rigardon. En lia menso kavalkadis la flustroj de liaj soldatkamaradoj, la minacoj de la oficiroj. Sed tiel amike rigardis al li tiu ĉi Czomboly.

— Nu! — instigis lin ankaŭ per vorto Czomboly. — Ĉu eble vi rifuzos?

— Mi dankas — diris simple Mihály Bakó.

Kaj el liaj okuloj nun falis la unuan fojon du larmogutoj pro la edzino.

El la hungara: Sándor *Szalay*

TRADUKA ĈEFVERKO

Sándor Petőfi: JOHANO LA BRAVA. Popolfabelo en versoj. Kvara eldono. El la hungara tradukis: Kálmán Kalocsay. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1984. 21 cm, 60 p. Prezo: 12,- ned. gld. (Por Hungario: 50,- Ft)

Tiu ĉi klasika verko de la hungara literaturo en la admirinda traduko de Kalocsay jam famiĝis en Esperantujo. Konatiĝu ankaŭ vi kun la naive ensorĉaj aventuroj de la hungara kampulido, kiu fine retrovas sian mortintan amatinon en Felando!

Tridek sep facilaj historiaj, verkitaj per la plej oftaj 400 resp. 700 vortoj de Esperanto, surbaze de la Baza Radikaro Oficiala de la Akademio de Esperanto.
Librofine vortareto kun ĉiuj uzitaj vortoj, kaj kun ties tradukoj en la angla,germana,hungara, pola kaj rusa lingvoj.
117 p. Prezo: 13,80 gld.
(Por Hungario: 55,- Ft)

Roĝer Mellion, Pariza emerita bankoficisto enamiĝas al iama filmaktorino. Lia edzino ne aplaŭdas al la neatendita evento. Lorjak lertege disvolvas el tiu ĉi simpla baza intrigo ridigan, amuzan romanon, kiu regalas nin krom ekscito ankaŭ per eminente eleganta stilo.
220 p. Prezo: 21,- gld.
(Por Hungario: 90,- Ft)

Gábor Szántó

NUDA PACO???

Nur dum la lastaj jaroj naturismo fariĝis akceptita en Hungario. Naturistoj fondis asocion, ili havas kampadejojn. Ne nur policanoj ne plu monpunas pro nuda sinbanado, sed ankaŭ la vasta publiko fariĝis pli tolerema, ŝajne la socio ĉesis mezuri moralecon per la proporcio de la vestokovrita korposurfaco dum banado kaj sunumado. Naturismo do „triumfis": nia artikolo ekzamenas tion, kiajn novajn problemojn naskis tiu ĉi „triumfo"?

Finfine ekbrilis la suno, sed la vento kiu forpelis la nubojn, neniel volis trankviliĝi. Ĝi trapuŝis la ondojn sur la lago, luktis kontraŭ la arboj, ŝutis sablon en la okulojn ĉie tra la kampadejo ĉe la lago de Délegyháza (pron. deeledjhaaza), kiun senefike ŝirmis la betona palisaro. Samtempe el Budapeŝto — pere de la laŭtaj radioj en la tendoj — ni bone aŭdis, ke tie la ventego iom perturbis la festan flugparadon, kaj ankaŭ la Danuban akvan paradon. Hodiaŭ — la 20an de aŭgusto — oni solenas nacian feston trioblan: la tagon de la Konstitucio, tiun de la unua hungara reĝo Stefano kaj tiun de la nova pano, sed tiu ĉi aŭtuna vento jam mesaĝas: baldaŭ finiĝos la somero, bonvolu jam vesti vin!

Kirliĝas disaj sentoj en mi, dum mi paŝadas inter la festaj spektakloj. Jes, mi skribas „spektakloj", ĝi estas la konvena vorto. Feliĉe, jam ne temas pri „batalfrontoj", ne necesas skribi raporton pri la „milito" ĉirkaŭ la naturismo, pri la tiamaj problemoj de la senveste, nude ripozantoj, ludantoj kaj sinbanantoj. Tiu „milito" ĉesis, kaj hodiaŭ oni festas en tiu ĉi naturisma kampadejo — la unua en Hungario — samkiel ĉie tra la lando la trioblan nacian feston, kaj krome, ankaŭ la trian jaron de la ŝtate aprobita naturismo.

La solena inaŭguro altiris nur malmultajn, plejparte la malnovuloj, la „veteranoj"

kolektiĝis ĉirkaŭ la kamionremorko, kiu servis kiel podio. La prezidanto de la asocio (vestita de la kapo ĝis la piedoj) kaj iu ĉarma vartistino (naske nuda, kiel decas ĉi-loke) disrompis la panon, volvitan per nacikoloraj rubandoj, kaj prezentis ĝin al la ĉirkaŭstarantoj: *gustumu ĝin!*

— Ĉu nur hostio? Mesa vino ne? — aŭdiĝis, kaj la profana demando turnis la ceremonian agon tra la eksplodinta ridego al la intencita familiara etoso. La pano dum minutoj konsumiĝis, rapide troviĝis ankaŭ „mes-vino", bedaŭrinde. Ĉar aperis jam elegantaj drink-budoj apud la lago, vendantaj vinon-bieron-brandon, ĉiajn alkoholaĵojn, kiuj pliigas la profiton kaj malpliigas la inhibiciojn... Kvankam la statuto de la asocio malpermesis — ne hazarde — la alkoholtrinkadon, tamen, ĉar laŭdire „oni pretendis ĝin", la negoco insiste enportis ĝin. Forte plendas pro tio la estro de la kampadejo: kiam misaĵoj okazis ĉi tie, plejofte de drinkaĵoj odoraĉis la kulpintoj, kiuj per aĉaj stultaĵoj ĝenis la sunumantojn, molestis knabinojn, kaj tiel plu... sed prefere mi lasu tion.

— Ni estas nek policistoj, nek psikologoj — li daŭrigas. Ni volonte akceptas ĉiun, kiu venas kaj volas aliĝi al la asocio. Sed poste, se li ne kondutas kiel decas, kiel estas atendeble de normala civitano, ni reprenas lian membrokarton, kaj forigas lin. Nur tio eblas niaflanke.

Kiam la naturistoj ne estis ankoraŭ oficiale aprobitaj, kaj nur „sovaĝe" ili kunvenis ĉe la lagobordo, tiu zorgo simple ne ekzistis. Veraj nudistoj estimas unu la alian, ili zorgas pri la ordo, pri la pureco de la ĉirkaŭaĵo. Kaj... sed kiel mi diru? Nu, ili rigardas al la okuloj de la aliaj, iliaj rigardoj ne glitadas supren-malsupren. Dum ili estis malmultaj, ripozante ankoraŭ senpermese, ili devis protekti sin sole kontraŭ eksteruloj. Necesis forpeli la spektemulojn, kaj abrupte surpreni iun vestaĵon, se proksimiĝis policano aŭ simila oficialulo. Kiel ĵurnalisto, mi jam antaŭ jaroj skribis plurfoje pri la intencoj kaj principoj de tiu movado, pri ilia luktado por la oficiala akceptiĝo. Kaj tiam, kaj nuntempe mi simpatias kun ili.

Tiuj luktadoj jam estingiĝis, paco alvenis tiurilate. Videble ili gajnis la „militon"; ili rajtis fondi asocion, kiu instalis sian terenon ĉe la lago de Délegyháza. Tra la lando multiĝas la oficialaj aŭ „preskaŭ-aprobitaj" banlokoj de la naturistoj. Ni vivas en libera lando, nia demokratio pli kaj pli profundiĝas: io ajn, kio ne ofendas la interesojn de aliaj, kio ne malutilas, tio ne estas malpermesata. Neniu ofendiĝas jam ĉe Balatono aŭ la Lago Velencei, se virinoj naĝas-sunumas sen mamzono, nek intervenas policisto „pro atenco kontraŭ la pudoro". Eĉ pli: neniu grumblas el la publiko portanta banveston. Oni akceptas la aferon pli mature...

Kiel ajn estas, tamen en Délegyháza la nudismo havas ankoraŭ la trajtojn de l' adoleska periodo, la junaĝajn konfuzojn.

— Sinkis la nivelo de la membraro — plendis veterano, kiu iam, en la tempo de la malpermeso, kuraĝis doni intervjuon kun sia nomo. — Multajn altiras la novaĵo, la spektaklo, sed ili ankoraŭ ne iĝis veraj naturistoj. Dubinde, ĉu ili iĝos tiaj! Ili venas, senvestiĝas, tamen ne por ĝui la grandan plezuron de la senvesteco, sed por vidi la nudecon de aliaj... Se dependus de mi, membrokarton mi donus nur al abiturientoj. Sen intelekto povas okazi misaĵoj...

Multe mi meditis pri liaj vortoj. Iomete li pravas, sed intelekton ne garantias dokumentoj pri ekzamenoj. Blovis daŭre malvarma vento, kaj mi vidis plurajn diplomitojn strange-duonnude: ili surprenis ŝuojn, ŝtrumpojn, puloveron — sed kalsonon ne. Normalaj nudistoj vestas sin normale, se malvarmiĝas la vetero.

— Ĉi tiuj ne estas naturistoj — diris mia konato —, nur *membroj*.

Ŝajnas al mi, ke li ne eraris.

Tiu, kiu nur iomete konas la historion, scias, ke la taskoj de la revoluciuloj estis ĉiam pli simplaj, ol la farendoj de la pacaj konstruantoj post la triumfo. Lukti kontraŭ io (tiukaze kontraŭ la falsa pudoro, kontraŭ la prudeco) kaj por io (ĉikaze por la rajto senveste

sunumi kaj bani sin) estis pli simple, malgraŭ la multaj ĝenaj malfacilaĵoj, ol post la „venko" organizi konvenajn cirkonstancojn, krei regulojn, kaj limigi la liberon por ke ĝi ne misiĝu ĝis trolibereco ofendanta aliajn. Detrui la malbonon, jam kutiman, estas ĉiam pli facile, ol konstrui ion nekutiman, ion novan. Se mi ne eraras, en tiu fazo troviĝas nun la nudistoj ĉe ni. Ili kreis kaj konstruis sian „ŝtaton". En Délegyháza ne nur palisaro estis konstruita; troveblas jam aŭtonomio, ankaŭ pordisto kaj kasisto, estas puto, necesejo kaj rubejo, eĉ helikopter-placo...

Apud la iamaj „sovaĝaj" nudistoj multaj miloj da asociaj membroj akceptis la preskribojn de la kampadejo. Ankaŭ ĉe la vasta publiko ĉesis la malamika sinteno, ĉar oni akceptis, ke ekzistas personoj, kiuj ne uzas banvestojn. Eĉ pli, tiu nova konduto pli kaj pli iĝis modo. (Deviga ĝi tutcerte ne estos, kredu al mi!) Sed post ĉio ĉi, naskiĝis la zorgoj de tiu paca epoko, eĉ interne de la bariloj...

Kriliĝis en mi disaj sentoj, dum mi pasadis inter la festaj spektakloj. Ĉar la konkuro kun hulahop-ringo iĝis troa spektaklo, abunde fotita el la vicoj de la rigardantoj; kvankam la organizantoj petis la konkurantinojn — esceptmaniere — surpreni balkalsonon, ja ne temas pri erotika prezentado...

Same okazis ĉe la belecokonkuro, kie la dek tri kandidatinojn ne nur fotoamatoroj, sed eĉ video-filmantoj surfilmigis. Antaŭe mi apenaŭ vidis fotilojn en manoj de nudistoj, sed dum tiu ĉi festo tiom multaj fotis, ke mia fotisto-kolego preskaŭ ne povis labori. Kelkaj bierodoroaj sinjoroj eĉ indignante riproĉis, kial li ne demetas sian kalsonon...

Cetere, mi estas nek amika, nek malamika koncerne la beleckonkurojn. Modaj aferoj ili estas, samkiel aliaj merkataj trukoj. Neniu problemo aperas, se ĝi restas ludo, se ne „fluas sango", se oni ne allasas infanaĝajn knabinetojn. Tamen ni haltu por momento: kial aranĝas entute nudistoj belec-konkuron? Ili ja deklaras — kaj multaj kredas tion —, ke tiu movado havas nenian rilaton kun erotiko; ne gravas, ĉu iu estas „bela" aŭ „malbela", sed oni estu ĉiel ajn sana. Nu, miaflanke mi neniam povis kredi tiun sloganon. Kiel „milita" frapfrazo provizore ĝi akcepteblas, sed dum paca periodo ĝi ne servu kiel programo. Ĉar ĝi estas hipokrita kaj malvera.

Ĝuste la belec-konkuro estis kiu altiris — kaj ne hazarde — multe pli grandan publikon, ol la aliaj spektakloj. Supozeble troviĝis ankaŭ nudistoj en tiu amaso. Inter la dek tri kandidatoj mian plaĉon trovis fraŭlino, kiu desegnis sur sin kato-maskon. Tiu ideo brile ellevis ŝin el la pli-malpli unuformaj konkurantinoj. Sed neniel plaĉis al mi, ke la publiko kaj la ĵurio — tro influita de l' aklamoj — aljuĝis la titolon „Miss Natura" al la plej juna kandidatino. Laŭdire 16 jara, tamen — kiel poste evidentiĝis inter kvar okuloj — apenaŭ ŝi plenumis la dekkvinan. Eblas, ke ŝi estas je nuanceto pli bela ol la aliaj — tio dependas de gusto —, sed ŝi estas ankoraŭ infano, sekve oni ne devus lasi ŝin konkuri kun plenaĝaj virinoj.

Kaj ĝuste tial, ĉar la naturistoj havas abunde da aliaj zorgoj. La paca periodo, kiel konate, perturbas ankaŭ la antaŭe ekzistintajn „batalvicojn", ekas kvereloj, prezentiĝas komplikaj solvendaĵoj.

Inter la unuaj la ĉefa problemo: al kiu direkto evoluos la movado? Ĉu ĝi povos gardi sian familiecan karakteron, la filantropajn kaj naturamikajn principojn? Aŭ rezignante pri ili, ĝi malfermos larĝe la pordojn — por akiri duban popularecon kaj veran monon — al cirkaj spektakloj kaj negocoj. La ĉi-lastaj jam alvenis: sur la iam trankvila lagobordo bruegis muziko, fluis drinkaĵoj, kaj la jam menciita vento pelis ne malmulte da rubaĵoj.

Por esti justa, mi devas diri, ke la asocio subtenas sin mem, la necesajn instalaĵojn oni financas el la membrokotizoj (nur kelkcent forintoj jare). Se ili ne ricevos subtenon de la socio, de instancoj — ekzemple turismaj —, povos okazi, ke la *membraro* forpuŝos la *verajn naturistojn* denove al la „nepermesitaj" bordoj. Kaj ĉio rekomenciĝos, denove.

Tradukis: E. Fenyvesi

Fotoj de Leif Heilbert

György BODORKÓS
metulargia inĝeniero,
ĉefteknologo

Novaj teknologioj en metalurgia fabriko (1.)

1. ENKONDUKO

Preskaŭ ĉiuj branĉoj de la klasika metalurgio troveblas ene de la plej granda Hungarlanda fabriko-komplekso, CSEPEL MŰVEK, en ties FERFABRIKO. Pro la vertikala fabrikado, niaj propraj ŝtalfornoj liveras la materialon por niaj produktaĵoj, precipe por la uzinoj, kies taskoj estas:

— fabrikado de Martin- kaj elektroŝtalo,
— senstampila kaj matrica forĝado,
— ŝtalbotel-fabrikado,
— ŝtalbloko-laminado,
— fabrikado de varme laminitaj senjuntaj tuboj,
— arkotubo-fabrikado,
— tubofabrikado per laŭlonga veldjunto, tubo-zinkado,
— nevarma tubo-eltirado.

Nun ni skize konigos kelkajn el la plej gravaj teknologiaj procedoj de la Ferfabriko, krome procedojn, kiuj ŝajnas konvenaj alternativoj por la baldaŭa aŭ venonta disvolvado en la fabriko.

2.1. ŜTALFABRIKADO

La ŝtalfabrikado komenciĝis tie ĉi en la jaro 1911, laŭ la tiam disvastiĝinta Siemens-Martin-rocedo. Ties esenco estas, ke sub skoriotavolo de certa konsisto, per oksidado, reduktado kaj alojado oni kreas ŝtallikvaĵon laŭ preskribita konsisto.

El ĉiuj ŝtalfabrikaj metodoj tiu ĉi estas la malplej postulema koncerne la kvaliton de la krudmaterialoj. Kvankam nuntempe la UHP-fornoj, ekipitaj per modernaj oksigenaj bruligiloj, ankaŭ tiurilate jam venkas super la Martin-ŝtalfabrikado, tamen, por utiligi la fabrikajn rubaĵojn, kaj por elaste akomodiĝi al la provizo de niaj propraj krudmaterialoj, niaj fornoj ankoraŭ plu funkcias. Esperigaj eksperimentoj daŭras por pliintensigi ĉi tiun metodon, ankaŭ por malpliigi ĝian energio-bezonon (i.a. KORF-metodo). Nuntempe funkcias du Siemens-Martin-fornoj por 50 tunoj kaj unu forno por 45 tunoj, kiuj estas alterne rekonstruataj. Estas uzataj 37-40 % da solida krudfero kaj 63-60 % da nealojita ŝtalrubo, per rub-krudfera bazeca procedo.

La metalajn kaj ne-metalajn almiksaĵojn enverŝas ŝarĝarganoj. La fandadon, la necesan varmegon ebligas miksitaj, tergaso-nafto-bruligiloj. Farante la dozadon laŭ la manieroj kutimaj ĉe la Siemens-Martin-procedoj, la taŭgan kvaliton kaj konsiston de la produktenda varo ni prizorgas per oftaj provprenoj kaj ties rapidaj analizoj (ARL). Provaĵoj estas prenataj:

— en la finstadio de la kunfandiĝo,
— dum la freŝigo en ĉiuj 10-20 minutoj, depende de la takto de la freŝigo,
— antaŭ la alojado kaj pre-senoksidado,
— antaŭ la elverŝo,
— antaŭ la muldado (dozoprovo).

La rezultoj de la provaĵoj revenas dum 5 minutoj. La favoran bazecon de 2,5 — 3,5 gradoj oni prizorgas ekzamenante la skorio-provaĵojn kaj laŭ tio manipulante la skorion.

La definitivan senoksidadon oni plenumas en la kaldrono, foje kaj en la elflu-kanalo, kaj en la kaldrono, samtempe. La plejmulton de la ŝtaloj ni senoksidas per la t.n. precipita metodo. La temperaturon de la ŝtallikvaĵo ni mezuras per sondiloj kaj post la fandiĝo, kaj antaŭ la elverŝo en la 55-tunajn kaldronojn, kiuj estas ekipitaj per ŝovrigliloj de tipo Flocon.

La ŝtaloj produktitaj per Siemens-Martin procedoj estas utiligataj unuavice por fabriki tubojn, sed laŭbezone ankaŭ por laminado kaj forĝado. Por tuboj oni uzas prefere rondprofilajn ŝtalmuldaĵojn, tamen ankaŭ kvadratprofilajn, foje rondajn krudŝtalblokojn.

Disvolvante ŝtalojn de tipo HSLA montriĝis neceso por ekonomia mikroalojado, malpliigo de l' sulfurenhavo kaj kaldrona manipulado. Por fabriki tiajn ŝtalojn, ni establis en nia Siemens-Martin-uzinopolvoblovan kaldronmetalurgian SL-instalaĵon, tre taŭgan por atingi la menciitajn celojn.

La teknologia multflankeco de nia entrepreno bezonas abunde da forte alojitaj instrumento-ŝtaloj. Tiucele ni enkondukis fabrikadon de elektroŝtaloj. Jam du arklumaj fornoj — 5 kaj 10 tunaj — produktas malalte, meze kaj alte

alojitajn ŝtalojn, plejparte por matrica kaj senstampila forĝado, kaj por ŝtalboteloj. Krome estas eblo por fabriki ankaŭ specialajn, altvalorajn ŝtalospecojn.

Almiksataj estas selektitaj ruboj kaj solida krudfero ĝis 3 procentoj. La alojado kaj la enforna manipulado okazas laŭ la kutimaj manieroj, kaj dume oni kontrolas la dozadon per oftaj provprenoj kaj rapidanalizoj, por eviti la internajn veziketojn kaj gasenhavon.

La ŝtalon oni elfluigas en 15-tunajn kaldronojn. La konsiston de la ingrediencoj oni regas — laŭ la kvalito de la ŝtalo — en la kaldrono, kie okazas ankaŭ la definitiva senoksidado. La ŝtalo estas poste verŝata en muldilojn, sed antaŭ tio la kaldrono ricevas vakuo-efikon dum 8 minutoj en vakukamero.

Do, ĉe ambaŭ metalurgiaj metodoj la ŝtalfabrikado finiĝas en la kaldrono. Por la surfaca kvalito ni uzas specialajn muldo-pulvorojn en la muldiloj, kies materialo estas globgrafita fandfero laŭ Mechanite-procedo, de kvalito SPF 600. Speciala formigo de la muldiloj ebligas la simplan varm-magnetan eltiradon. La maso de la muldaĵoj estas 0,3 — 2 tunoj.

La vasta gamo de la produktataj ŝtalospecoj etendiĝas — pro la bezonoj de la vertikala produktado — disde la plej simplaj konstruŝtaloj ĝis la altnivelaj specialaj. Por firmigi ilian kvaliton, ĉiuj procedoj bezonas regulan kontroladon. Estu menciataj tiurilate kaj la kontinua temperaturmezurado, kaj la intermita kontrolado pri la oksigenhavo en la ŝtallikvaĵo, pere de sondiloj; krome la moderna rapidanalizejo, helpanta facile regi la kemian konsiston. En transport-dukto alkuras tien la provaĵoj prenitaj el la ŝtallikvaĵo. La analizo de la moderna spektroskopo ARL de tipo 34000 CB, post 5-6 minutoj jam revenas per telekso al la laborloko de la uzino.

2.2. FABRIKADO DE VARME LAMINITAJ SENJUNTAJ TUBOJ

Tiajn senjuntajn tubojn nur nia entrepreno produktas en la lando. Ni fabrikas ilin parte per trua-etenda laminado laŭ sistemo Mannesmann-Pilger, parte per ŝovbenka procedo. Tiuj estas la bazaj teknologioj, sed ilin kompletigas reduktaj kaj kalibrigaj procedoj, iom ankaŭ la varme-eltira teknologio. La fabriko disponas pri ses varme laminantaj maŝinlinioj por tubofabrikado. Ĉe nia Ŝovbenko I estis unuafoje aplikitaj la rulum-ingoj anstataŭ tirringoj.

En la sekvaj ni konigos iom pri la bazaj teknologioj de la senjunta tubofabrikado.

2.2.1. Tua etendo sur oblikva laminator-linio

Ĉe la tubofabrikado per oblikva laminado, oni truas la rondblokojn kaj rondŝtalojn, laŭ sistemo Mannesmann, per kruclaminado sur oblikvaj laminatoroj *Fig. 1).*



Fig. 1. Truanta laminado laŭ Mannesmann (oblikva laminado)

La trua-laminatoro de tipo Mannesmann konsistas el du laborcilindroj duoble-konusaj kaj el unu gvidcilindro. Ties aksoj formas angulon al la akso de la prilaborata peco. La gvidcilindro (kune kun la gvidlato) devas reteni la rondprofilan pecon inter la laborcilindroj. La konusaj oblikvaj cilindroj tiras la pecon inter sin, poste premas ĝin al konusa lanco. La unua parto de la laborcilindroj truas la pecon; en la dua fazo formiĝas la kruda tubo, kun egalaj vandodikoj.

2.2.2. Laŭetape etendanta Laminado

La tubo-etenda laminator-linio de sistemo Mannesmann konsistas el du-agaj laminatoroj kaj unu doziga aparato. Tiajn laminatorojn karakterizas, ke la cilindroj rotacias en direkto kontraŭa al la irado de la laborata peco, krome ke

el la cilindroj estas eltrancîta speciala fragmento *(Fig. 2)*. skize montras la laminadon: la cilindroj kaptas la tubon kaj ekpremas ĝin (A); laminante ili etendas (B); la cilindroj jam formas la rondprofilon de la tubo kaj egaligas ĝin (C), poste ili ĉesas fiksi la tubon (D). Tiam la dozigilo plu ŝovas la tubon, kaj sur la ankoraŭ kruda parto de la tubo ĉio rekomenciĝas disde A) kiel supre. Intertempe oni devas turni la tubon per 90 gradoj, pro la okazinta misformiĝo.



Fig. 2. Laŭetapa etenda pilgerlaminado

La doziga aparato antaŭŝovas laŭetape la krudan tubon kaj samtempe ĝin rotacias; la aparato troviĝas sur la hidraŭle movata antaŭenŝovilo. Tiu dozilo funkcias pere de hidraŭle bremsita aercilindro, en kiu la piŝto kunpremas la aeron dum la labora fazo de la laminado. Tiu aerpremo haltigas la revenantan piŝton, kaj repuŝas ĝin antaŭen, kune kun la mandreno (stango), kiu penetras en la tubon. La akcelon de la piŝto haltigas la ingo de la hidraŭla bremso, kaj la laborcilindroj komencas novan etapon A).

2.2.3. Senjunta tubofabrikado sur ŝovbenko

Tiu procedo estas fakte la klasika teknologio de la senjunta tubofabrikado. Ankaŭ tie okazas truado, same la sekva etendado. Por krudmaterialo servas ŝtalblokoj kun diametroj de 90 — 150 mm. La krudan ŝtalblokon maŝintondilego dispecigas laŭ la deziratai longoj. Tiujn pecojn reardis ŝovforno, respektive rondforno. Post kiam oni elprenis ilin, la ŝtonblokoj traspasas kalibrigon, poste truadon per vertikala hidraŭla premilo *(Fig. 3)*.

La ŝovbenko konsistas el vico da kalibrigaj rulumoj de malkreskantaj diametroj. (La originalajn tir-ringojn la hungaraj fratoj Korbuly anstataŭis per rulum-metodo.) Mem la rulumoj triope konsistigas unu fermitan — kalibrigan



Fig. 3. Hidraŭla truado sur ŝovbenko

— rulum-ingon *(Fig. 4)*. La tubo, pasanta tra la rulumoj, alpremiĝas sur la mandrenon, kaj dume ĝia vandodiko malpliiĝas pro la lamina forto de la rulumoj. La proceson de la etendado



Fig. 4. Skemo de ŝovbenka rulum-ingo

montras la *Fig. 5*. Por granddiametraj tuboj oni aplikas ankaŭ kvar-rulumajn ingojn. La nombron de la rulumingoj oni ŝanĝas laŭ la bezonata vandodiko.

La etendita tubo — kune kun la mandreno pasas inter konvekse formitaj malstreĉigaj cilindroj. Tie la tubo fine disiĝas de la mandreno, kiun forigas ĉene movata aŭtomata makzelo.

Fig. 5. Tubo-etendado sur ŝovbenko



2.2.4. Kalibrigo kaj reduktado

Ĉe la priskribitaj tub-etendaj procedoj la internan diametron de la tubo formas mandreno aŭ „borilo". Ties mezuroj tamen havas suban limon, sub kiu mezuro nek eblas, nek indas kun pli malgranda diametro fabriki tubon per etendado. Tiuj procedoj ja metas neeviteblajn obstaklojn koncerne la bonan tubosurfacon kaj precizajn dimensiojn (ĉe la diametro kaj vandodiko). Krome oni devas ŝanĝi por ĉiuj diametroj kaj vandodikoj la cilindrojn (rulumojn) kaj la mandrenon. Superi tiujn malavantaĝojn, estis kreitaj la kalibrigaj kaj reduktaj laminatoroj prilaborantaj la etdiametrajn tubojn *(Fig. 6.* kaj *7).*



Fig. 6. Skemo de kalibriga laminado



Fig. 7. Situo de la reduktaj cilindroparoj

La cilindroparoj en tiuj maŝinoj havas unu post la alia pli kaj pli malgrandajn diametrojn. Konforme malpliiĝas la diametro de la tubo, kaj proporcie kreskas ĝia longo. La turnfrekvenco de la opaj cilindroj ŝanĝiĝas proporcie al la diametra malkresko.

La kalibriga maŝinaro havas la taskon doni precizan diametro-mezuron al la malprecize prefabrikita tubo, korektante ankaŭ la eksteran tubosurfacon. Pro tio, ĉe la kalibrigaj cilindroparoj la malkresko de la diametroj estas pli modera.

La reduktaj laminatoroj similas al la kalibrigaj, sed ili havas malpli da cilindroparoj, ankaŭ ties diametroj pli forte malkreskas. La turnfrekvenco de la cilindroj estas regulitaj tiel ke la tirado ne modifas la vandodikon de la prilaborata tubo.

La tubofabriko uzas tiujn laminatorojn kun 16, 18 kaj 32 cilindroparoj.

2.2.5. Varme-tirado

Por fabriki etdiametrajn (malpli ol 51 mm) tubojn kun dika vando, ofte por fabriki nur etan kvanton, ni aplikas la procedon de varme-tirado. Komence la tubojn oni devas ĉepinte redukti per martelado; post reardigo en gasforno ili estas tirataj sur ĉena tirbenko. Sekvas fridigo sur fridbenko. La principo de la procedo identas kun la priskribota nevarme-tirado; kiel tirringon ni uzas simplan gisaĵon, kiu estas ŝanĝata post ĉiu tirado.

2.2.6. Komplementaj teknologioj ĉe fabrikado de varme Laminitaj senjuntaj tuboj

Por fabriki varme laminitajn senjuntajn tubojn ni aplikas la sekvajn komplementajn teknologiojn:

Ardigo de la bazmaterialo
Forno
Rondforno gashejtita
(3-zona)
Rulforno gashejtita 2-zona

Laminilo-linio
Granda maŝinlinio. Ŝovbenko II
Rapid-pilgerlinio,
Meza maŝinlinio, Malgranda maŝinlinio,
Ŝovbenko I.

Reardigo antaŭ reduktado kaj kalibrigo
Rulforno gashejtita — 8 kalibrigaj, 18 kaj 32 reduktaj cilindroparoj,
Paŝiga forno, gashejtita — 16 kalibrigaj cilindroparoj.

Tubodispecigaj instalaĵoj
Glitaj aŭ baskulaj varmsegiloj forigas la neuzeblajn tubofinojn, la difektitajn finaĵojn, kaj dispecigas la tubojn.

Refridigo de la tuboj. Post varma laminado ni malvarmigas la tubojn sur fridkadro aŭ ĉena fridbenko.

Egaligo de la tuboj
Post la reduktaj kaj kalibrigaj maŝinlinioj la tuboj estas varme egaligataj sur du-rulumaj hiperboloidcilindraj maŝinoj.

Apretado de la tuboj
Antaŭ la var-ekzameno kaj livero ni forigas la neuzeblajn tubofinaĵojn, kaj tranĉas la tubojn je la deziratej longoj. Post la tranĉado ties surfaco estas fajlata.

(Daŭrigota)

Trad.: Ervin *Fenyvesi*

LIBRO AKTUALEGA EN LA JUBILEA JARO!

ekkonu la historion de la heroa pionira periodo de nia lingvo per la riĉenhavaj artikoloj de



**kiu estas fidela spegulo de la Esperanto-movado inter 1887-1934.
Ĝin verkis plejparte homoj, kiuj mem travivis la starton
de Esperanto, kaj tiel la informoj kiujn ili liveras, estas la plej aŭtentikaj.**

600 p. Bindita. Prezo: 45,- ned.gld. (Por Hungario: 285,- Ft)

Stilekzercoj

(Fragmentoj)

Raymond Queneau

LA BAZA HISTORIO

Sur la linio „S", en vigla trafikhoro. Ulo plimalpli dudek ses jara, mola ĉapelo kun galono anstataŭ rubando, kol-ego kvazaŭ tire plilongigita. Multaj elbusiĝas. La pritraktata ulo ekindignas kontraŭ najbaro. Lia riproĉo: tiu ĉiufoje ekpuŝas lin, kiam iu prterpasas. Plendaĉa tono laŭintence malica. Ekvidante liberan sidlokon, li tuj ekposedas ĝin.

Du horojn poste mi renkontas lin sur la Cour de Rome, *antaŭ la stacidomo Sankta Lazaro. Akompanas lin amiko, kiu parolas al li jene:*

— Vi devus metigi aldonan butonon sur vian surtuton.

Li montras al li kien (sur la klapon) kaj kial.

ANTONIMA

Noktomezo. Pluvas. Aŭtobusoj veturadas preskaŭ malplenaj. Sur la kapoto de aŭtomobilo, proksime al Bastille, *maljunulo senĉapela, kun kapo enŝultriĝinta, dankas sinjorinon malproksimege sidantan pro certaj mankaresoj. Poste li ekstaras sur la genuoj de sinjoro, kiu ne forlasas sian sidlokon.*

Du horojn pli frue, antaŭ la stacidomo de Liono, la sama maljunulo ŝtopis al si la orelojn por ne aŭdi la vagulon, kiu tute ne inklinis diri al li, ke necesus malsuprenigi je unu truo la plej suban butonon de lia kalsono.

SAMKOMENCA — DU VERSIOJ

Somere, sur „S", sesfoje sepduonjara spontaneulo, supre strangan surkapaĵon surportanta, subite, senhonte surprizas sinjoron, skandale skoldas sian sambusanon, supozigante siaparte sinsekvajn, sovaĝajn, surpiedajn suferigojn; sentante sian sensukceson, senespere surĵetas sin sur senpasaĝeran sidlokon.

Su sorojn soste, santaŭ sa stacidomo Sankta Sazaro, si simarkis sin siskutantan sri sutonoj sur sia surtuto.

Transpirante sur trafikilo, mi travidis tragikomedion: transcendan travestiitulon tragike trafis traktorecaj, traŭmatigaj translacioj de trapezstatura trampo; li tranĉe traktis ili („tra ra ra, tra ra ra"), sed trankviliĝinte li tratrotis en tranco la trafikilon kaj fine tranĉeis sin.

Du trarojn poste, trantaŭ la tracidomo Trankta Trazaro, li trarolis kun tramiko pri tratono.

LIBERAJ VERSOJ

L' aŭtobuso
plena
la koro
vaka
la kolo
longa
la rubando
plektita
la piedoj
plataj
plataj platigitaj
la loko
libera
kaj la renkonto neatendita ĉe la stacidomo kun mil estingitaj fajroj
de ĉi-koro, ĉi-kolo, ĉi-rubando, ĉi-piedoj,
de ĉi-loko libera
kaj de ĉi tiu butono.

PORTRETO

La ŝtilo estas dupiedulo kun tre longa kolo, kiu frekventas la aŭtobusojn de la linio „S" ĉirkaŭtagmeze. Ĝi aparte preferas la malantaŭan platformon, kie ĝi staradas kun muka nazo; ĝian kapon kovras kresto, ĉirkaŭita de fingrodika elkreskaĵo, sufiĉe simila al kordo. Malbonhumora, ĝi volonte atakas pli malfortajn ol ĝi, sed, renkontante iom energian kontraŭstaron, ĝi ekfuĝas internen de la veturilo, kie ĝi klopodas forgesigi sin.

Ĝi videblas ankaŭ, sed multe pli malofte, en la ĉirkaŭaĵo de la Stacidomo Sankta Lazaro, en la tempo de la haŭtŝanĝo. Ĝi tamen gardas sian malnovan haŭton kontraŭ la vintra malvarmo, sed ofte deŝiritan por allasi aeron al la korpo; tiuspeca kovraĵo fermiĝas sufiĉe alte, dank' al komplikaj metodoj. La ŝtilo, kiu ne kapablas mem malkovri ilin, devas serĉi la helpon de similspeca dupiedulo, kiu farigas al ĝi ekzercojn,

La ŝtilografio estas branĉo de la teoria kaj dedukta zoologio, praktikebla en ĉiuj sezonoj.

MONOLOGO

Ĉu puŝi aŭ ne puŝi — tiel staras
Nun la demando: ĉu pli noble estas
Elporti ĉiujn ŝovojn, ĉiujn movojn
De la labila ulo, aŭ sin armi
Kontraŭ la tuta buso da mizeroj
Kaj per la surlokiĝo ilin fini?
Eliĝi, marŝi kaj nenio plu!
(...)
...la mizeroj teraj longe daŭras:
Alie kiu volus elportadi
La vidon kaj renkonton de la ulo,
La vortojn de amiko, la konsilojn
De fierulo, falson de la juĝo?
(...)
Jes, kiu volus tiun veston porti,
Se mem, per translokigo de butono
Li povus ĝin entute almodigi?

El la franca: István *Ertl*

GAJA PAĜO



OPORTUNISTO

— Sinjoro profesoro, vi instruas psikologion kaj Esperanton. Bonvolu informi niajn legantojn pri via direktoro, la lingvisto. Kio estas via opinio pri li?

— Volonte, sinjoro ĵurnalisto. Nia direktoro estas tre brava homo, kiu vere amas sian familion.

MALOPORTUNISTO

— Sinjorino, vi devas scii, ke estante via ĉefo, mi rigardas vin nur kiel koleginon, kaj ne kiel virinon.

— Kial? Ĉu mi ŝajnas tiel malbela?

PSIKO-LOGO

— Imagu, la psikologo abrupte solvis ĉiujn miajn familiajn problemojn!

— Grandioze, amiko! Ankaŭ mi bezonos liajn servojn!

— Jam vane! Li logis kaj forkaptis mian edzinon...

PSIKO-DISO

Antaŭ la matrikulisto, la ege distriĝema profesoro alparolis virinon:

— Ĉu vi iĝos ĉi tie mia edzino, aŭ ĉu vi estas nur atestantino?

INTER SAMIDEANOJ

— Mia opinio pri la pronomoj tute ne kongruas kun la via!

— Sed pardonu! Eĉ unu vorton mi ankoraŭ ne diris...

— Eĉ tiam mi ne konsentas!

VARIA MONOTONO

Finiĝis la psikologia ekzameno. Ameno, la psikologo deklaras:

— Ŝajnas, ke vin ne kontentigas la nuna laboro, vi pensas pri io pli varia, sinjoro Tameno.

— Ho ne, mia laboro tute konvenas al mi.

— Kion do vi faras?

— Mi stampas leterojn.

— Sed tio estas ja teda letero dum longaj monatoj!

— Kial teda? Ĉiutage ja ŝanĝiĝas la dato!

MONOTONO

Kiam mi ekvidas belegan inon, mi ŝatus havi almenaŭ tridek jarojn pli.

— Eble malpli, vi volis diri, ĉu ne?

— Ne, ne! Ĉar tiutempe jam ili ĉiuj — feliĉe — tutegalos por mi...

MONOTONA FERIO

Enuas la gasto en la ferihejmo, kaj ĝenas la mastron, li montru ian lokan interesaĵon. Finfine tiu komencas:

— Ĉu vi vidas tiun montdeklivon? Pasintjare geamantoj, juna paro ekiris sur ĝi supren. Pli kaj pli supren ili iris.. ĝis ili malaperis. Neniam ni vidis ilin plu...

— Aĥ, interesege! Tamen, kio okazis al ili?

— Nu, ili subeniris sur la transa deklivo.

NE MONOLITO

En nekutima horo — kutima tamen en ŝercoj — hejmenirante la edzo trovas ĝuste sian plej bonan amikon en la geedza lito kun ŝi. Maltrankvile la edzo rigardas la scenon, fine li ekvoĉas:

— Mi havas ja tiaspecan devon tie ĉi, sed vin kiu devigis?

ANTAŬ NIA VENKO

— Estis grandioze, kim mi vizitis somere la belegan Parizon. Tamen, mi ne preferus naskiĝi tie...

— Sed kial ne?

— Ĉar eĉ unu vorton mi ne konas el la franca...

ĈU AL LA SUNO?

— Ĉu ĝuste dum julio vi vojaĝos al Egiptio? La termometro montros kvardek gradojn en ombro!

— Nu? Mi ja ne devos ĉiam sidi en ombro!

FRENEZAĴO

— En la Aŭstralia naturprotektejo samideanoj intencis prezenti al mi eĉ veran tribestron, sed li troviĝis jam en malsanulejo.

— Interese. Kial?

— Antaŭtage li aĉetis novan bumerangon, kaj li volis forĵeti la malnovan...

Ervin *Fenyvesi*

SIMPATION AL LABORISTOJ...

esprimas la hungara poeto Gyula Juhász en sia poemo: „Al fronto de Laboristhejmo". Ties lastajn versojn ĉisube ni citas:

Labori ek, sen laco, sen ŝancelo
dum vivo lumas, ĝis la lasta tag'"

— la sekvajn du versojn vi trovos en la linioj H.1. kaj V.18. (ensendendaj). Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

Limdato: du monatoj post la apero de tiu ĉi numero.

HORIZONTALE: 15. Surskribo sur la kruco de Kristo, 16. 2010, 17. Demanda adverbo, 18. Iompostiome disvolviĝi (R), 20. Rimedo, procedo, laŭ kiu afero fariĝas (R), 21. Resti vertikale (R), 22. Analoga, 24. Arĝentblanka metal', 25. Arde, 26. Ĉina religia ...ismo, 27. Devenaj el Italia urbo, 29. Konforman al la vero, 30. Verba finaĵo, 31. Fikse kunmetis partojn, 32. Ago por kontroli, 33. Insulo de grafo Monte Christo, 34. Tuto de la cirkonstancoj, 36. Salo de klorata acido, 38. Kavet', 39. Estanteco, 40. Fari brila, 41. Italia aŭtofabriko, 42. Prabovo, 43. Artefarita organo, 44. Sidu kiel reĝo, 45. Greka litero, 46. Planedo inter Saturno kaj Neptuno, 47. Digon en haveno, 49. Komenco de H.44., 50. Artefarita hararo, 52. Duono de tago(!), 53. Frukto kun ligneca ŝelo (R), 54. Scienca prefikso por „nova", 55. Alĝeria havenurbo, 56. En tia urbo estis la Kongreso, 58. Ĝi transformas alian energion en mekanikan, 60. Saltanta kvarpiedulo, 61. Moke kritikanta verko, 63. Grado de alteco en komparo (R), 64. Eligi laŭtajn voĉojn (R), 65. Oratoraĵo, 67. Eksterordinara kapablo por krei (R).

VERTIKALE: 1. Superhoma estaĵo (R), 2. Tre sopiras havi ion de aliulo, 3. Grava malmola metalo, 4. Fantazia lando de nanoj (ĉe Swift), 5. Sufikso por ago, 6. Alkoholaĵo (R), 7. Agas nedifineble, 8. Glasoj sonas, 9. Apartenantaj al ili, 10. Paradizo (R), 11. Prepozicio, 12. Parto de parko (!), 13.



Muzika intervalo, 14. Tajlanda, 19. Iama lancisto, 21. Ano de Eŭropa popolaro, 23. Reen: prepozicio, 25. Premŝovadi ion al io, 28. Danĝerega batalado, 29. Eŭropa ĉefurbo, 31. Grava parto de V. 40., 32. Malliberej', 33. Persujo (R), 35. Alta konstruaĵo, 36. Mono en Skandinaviaj landoj, 37. Grasa likvaĵo (R), 38. Respondo al „kion?", 40. Membro de homo, 41. Malvarmigu glacia! 43. Frukto, 44. Dokumentujon, 46. Muzo de la astronomio, 47. Ĉefurbo de Filipinaj Insuloj, 48. Radiado okule perceptebla (R), 49. Terspaco de aktivado, 51. Neĝuste, 52. Surskrib' de libro, 54. Mallonga proza verko (R), 56. Veturilo, 57. Semida lingvo (R), 59. Reen: instrumento, 61. Plenstomaka (R), 62. Lirika poemo, 65. Samspecaj de pano, 66. Valormetal'.

I.Z.



Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Márton Fejes

LA ALTA AKVO
de
István Nemere

Tiu ĉi plej nova originala romano de la aŭtoro havas temon modernan, ĝi priskribas problemojn aktualajn, ankaŭ homajn sentojn eternajn.

1. Kio estas la baptonomo de inĝeniero Nogradi?
2. Kiel nomiĝas la hundo de Peter?
3. „Mi foriris, kaj iniciatis eksgeedzigan proceson." — Kiu skribis tion, kaj al kiu?

Limdato por la respondoj: du monatoj post la apero de tiu ĉi numero.

La verkoj de la sekvaj ekzamenoj: En la n-ro 1986/6: „Urboranda nokto"de Attila József; 1987/1: „Hura!" de Julio Baghy; 1987/2: „Obsedita de l' Suno" de István Gáll; 1987/3: „Mariagnes" de Lorjak; 1987/4: „Baza Legolibro por Komencantoj".

La solvojn de la enigmoj ni aperigos en nia sekva numero.

Leterkesto

— Maria JAGIELLO, Gliwice, PL: Nian redaktejon atingas multaj leteroj, ankaŭ manuskriptoj verdire el la tuta mondo. Ni alte taksas la fidon de niaj legantoj, ne malpli tiun de la sendintoj de poemoj kaj noveloj, kiuj proponas publikigon en nia revuo. Domaĝe, la cirkonstancoj malebligas, ke nia redakcio je ĉiuj leteroj sendu respondon. Ni simple ne havas tiom da tempo kiom tia korespondado bezonus. Bonvolu kompreni, ke ne petitajn literaturaĵojn prijuĝi kaj informi la verkintojn, montriĝis tasko, kiun nia redakcio ne povas surpreni. Memkompreneble, eĉ se ni trovas eventuale publikindan verkon, ĝis ĝi havos lokon en Hungara Vivo, necesos pli-malpli longa tempo, neniel antaŭvidebla. Bedaŭrinde ni nek gardas, nek resendas manuskriptojn — samkiel ĉiu ajn redakcio. Kopiojn de la (tajpita) manuskripto la verkintoj verŝajne havigas por si. Laŭ niaj spertoj, en ĉiuj E-rondoj troveblas membroj, kiuj povas helpi tiurilate.

* * *

— Vláda HASALA, Valtice, CS: Ni danke ricevis la elstare belan E-bildprospekton „Ĉedok prezentas Ĉeĥoslovakion". Ĝi vere meritas disvastigon inter vojaĝemuloj. Precipe bonvenigos ĝin tiuj, kiuj intencas partopreni la stabilan Someran E-Tendaron en Lančov, do ne malmultaj. Skribu al ČEDOK, Esperanto-centro, Praha, Na prikopé 18, CS-111-35 por la E-prospekto.

* * *

— S-ino FAN Huj-pin, lektorino, Jinan-universitato, Ĉinio. La pakedo de diversaj E-revuoj espereble jam alvenis al via universitato. Ni havos plezuron, se ili helpos sukcese la E-lernadon, respektive la instruadon de Eo al viaj disĉiploj en la E-klaso. Multe da sukceso en via brava agado!

* * *

ROMANO,
KIU GRIMACAS

Julio Baghy: HURA! Romano. Dua eldono. Kun ampleksa postparolo de Vilmos Benczik. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1986. 19 cm, 438 p. Bindita. Prezo: 36,- ned. gld. (Por Hungario: 180,- Ft)

Kio okazas, se al malriĉa urbo kun koruptaj gvidantoj oni testamentas 230 milionojn da dolaroj, sed la kondiĉoj de la testamento estas malhonorigaj por la koruptaj gvidantoj? En tiu ĉi klasika romano de la Esperanta literaturo Baghy majstre interplektas satiron kun pensiga filozofio, ofertante instruajn kaj samtempe gajajn leghorojn al siaj legantoj. La riĉe vidiga kaj tamen facila lingvo estas nur aldona garnaĵo!

Korespondi deziras

E-Klubo NORDA STELO ktm, pĉt, kol. bk, E-aĵojn: NORILSK, ul. Lenina 9. SU-663.305. * Vladimir VASILKOV (42) pentristo, pri pentroarto. NESTEREVO, Gijĉe 165, Ukrainio, SU-292.362. * Hanna GACA ekonomikistino, ktm, pri literaturo, lingvoj, vojaĝoj, poezio, human-sciencoj. Kol. orajn pensojn. SKIERNIEWICE ul. Rózy Luksemburg 1.18., PL-96-100. * Wladyslaw DZIALAK (47) oficisto, pri filmo, sporto, muziko, foto, kol. bk, pm, E-revuoj. KIELCE Ul. Armii Czerwonej 160/55, PL-25-324. * Kaja TÄHE (17) lernantino, ktm, pri junularo. HAAPSALU rajoon, Karuse Kolhozo, Estonio, SU-203.194. * Hans-Georg KAISER, kol. bk pri bestoj/arboj, Eo, muzeoj, ŝipoj. ALTENBURG Wenzelstr. 12, DDR-7400. * F-ino Elzbieta KOSIK (26) ktm pri vojaĝoj, literaturo, historio, interŝ. E-aĵoj, bk, pm. HRUBIESOW ul. J. Krasickiego 3. PL-22-500. * F-ino Grazyna MADEJ (22) med. studentino, pri sporto, vojaĝoj, ser./leĝ. muziko, ankaŭ angle. Woj. KATOWICE, Wierzchowisko 121, PL-32-355. * Georgij KUDRJA (50) pentristo, pri grafikarto, KRASNODAR, p/k 48, SU-350.000. * Tatjana BOROVAJA (23) flegistino, pri literaturo, turismo, kino, foto, muziko. KRASNODAR str. 40 j. Pobedi 69/211. Sovetio. * Natalija ŜOZDA (18) med. infanflegistino, ktm. pĉt. HAPSALU Rahu 10-6. Estonio, SU-203.170. * Aleksej BUTKIEWICZ (27) laboristo, pri geografio, foto, sporto, kol. bk, pm. JASIONOWO Szypliszki, PL-16-411. * Krysztof KRÓL (25) pri muziko, estonteco de energioj, kol. disko, pm, aŭto-prosp, pk. ZGIERZ Tetmajer str. 7. PL-95-100. * F-ino Olesja TUĈKOVA, lernantino, ktm pri muziko, literaturo k.a. NORILSK str. Talnahskaja 21-49, SU-663.305. * F-ino Ĵanna ROMANOVA (15) ktm, pri sporto, muziko, literaturo. NORILSK str. Talnahskaja 17-380. SU-663.305. * F-ino Džilda JUKNAITÉ (18) ktm pri sporto, turismo. Kol. pk kun hundoj, katoj kaj urboj. Komjaunimo 38, PASVALYS, Litovio, SU-232.250. * S-ro Phan Kjon Vjet ktm, pĉt. 06 Hoang Hoa THÁM, urbo NHA TRANG - PHÚ ICHÁNH, Vjetnamio.

F-ino Ilona STYCHNO (20) kun gehungaroj, pri naturo, vojaĝoj k.a. WYSOKA, ul. Robotnicza 4, PL-42-457. — Leonid MJASNIKOV instruisto de lingvoj, ktm pri libroj, movado, lingvoj. VELIKIE LUKI, str. K.Libkneht 3. 1/15. SU-182.100. — S-ro Jacek GOLACZYNSKI (20) pĉt., literaturo, montarturismo, skiado. JELENIA GÓRA, ul.Kobberga 3/9h, PL- 58-506. —

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik * Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Tibor Bessenyei, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits. * Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi. * H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 141-078, 334-194. Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. * Respondeca aldonanto: Oszkár Princz. * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96-162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto. * Presis la Presejo de HEA. Indexszám: 25 377 0018-7704.

CHEMO CAOLA

Komuna Entrepreno de Ekstera Komerco
por Kosmetikajoj kaj Dommastrumaj Kemiajoj

1113 BUDAPEST Bocskai út 90. Hungario
Telekso: 022-4333 Telefono: 0036-1-666-622

viro kaj virin' en ĉiu aĝo
gesinjoroj, kies agojn direktas saĝo
vian domon faros pura, vian korpon sorĉos bela
vian sanon tenos bona kaj perfekta kaj modela...

CAOLA

HÚSIPAR

/Viandaĵprodukta Entrepreno/

SZÉKESFEHÉRVÁR

VIDU GUSTUMU KONSUMU NIAJN PRODUKTAĴOJN!

1987 JAN 29